

V-19119/11 (1935)

# OOMOTO



# INTERNACCIA

Aprilo

1935

Oomoto Centra Oficejo

Kameoka Kioto-hu Japanujo



Parto de Oomoto-Teritorio de Kameoka. Meze staras la ĉef-sanktejo Gekkjuu-den, dekstre Oomoto-Muzeo.

## Kvintesenco de OOMOTO

**Deveno kaj Celo:** La vorto «Oomoto» signifas Fundamenton. La Fundamenta (aŭ Centra) Dio, Kreinto de la Universo, aperis en la sankta loko Ajabe (Japanujo) en la jaro 1892 kaj deklaris pere de Sinjorino *Nao Deguĉi* sian planon por la reformo de la Mondo. Ni nomas Sinjorinon *Nao Deguĉi* la «Fondintino» de Oomoto. La dia Reformplano konsistas en la ekstarigo de pli perfekta mondo, verdire la ĉielregno baldaŭ venos sur la Teron. Oomoto-Movado fervore laboradas por la baldaŭa efektivigo de la Dia Plano.

**Nuna Stato de Oomoto:** Post la ĉieliro de la Fondintino, nia movado daŭrigis sian agadon sub la aŭtoritata gvidado de Majstro Onisabro *Deguĉi*, adoptita filo de la Fondintino. Li estas eksterordinara homo, vera geniulo, eminenta en diversaj artoj kaj sciokaj. La nuna mondo baraktas meze de ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj aliaj malsanoj. Ni firme kredas, ke nia spirita Gvidanto estas la de Dio destinita Homo, sole kapabla piloti la ŝipon de la Homaro el inter la rifoj de hodiaŭo al la paca haveno de morgaŭo.

La Centro de Oomoto sin lokas en Ajabe, la Administrejo en Kameoka (Japanujo). Lokaj Centroj estas en Mukdeno kaj San Paŭlo, kaj pli ol 2,000 filioj ekzistas ne nur en Japanujo sed tra la mondo. Krom pluraj japanlingvaj organoj, monata gazeto «OOMOTO INTERNACIA» aperas en Kameoka. Nia Doktrino estas tolerema: ni unuigas kun Orientaj potencaj spiritmo-

vadoj kiel Tao-Yuan kaj Universala Ruĝsvastika Asocio; ni ankaŭ kunlaboras kun pluraj spiritaj movadoj — Tsaili-Hui, P'uch-Hui, Anching-Chao, Lamaismo en la Oriento kaj Blanka Fratara, Grandega Mondo - Kristana Spiritualista Ligo en la Okcidento. Ni ankaŭ fondis Universalan Homaman Asocion kaj Ligon de Religioj, kiuj bone laboras por la mondopaco. Ni vokas al ĉiuj tutmondaj gesamideanoj je komuna kunlaborado por pli bona kaj pli bela estonteco.

### Maksimoj:

1. Observu la veran aspekton de la Universo kaj konsideru, ke ĝi respegulas la *Korpon de Dio*.
2. Konsideru la seneraran funkciadon de la Universo kaj rekonu la *Forton de Dio*.
3. Konsideru la koron de la vivantaĵoj kaj komprenu ke ĝi estas koncipita de la *Animo de Dio*.

### Ĉefinstruo:

Dio estas spirito loĝanta en ĉio de la Universo, kaj homo estas la reganto de la mondo. Kie unuigas Dio kaj homo, tie ekestigas senlimaj fortoj kaj aŭtoritateco.

### Devizoj:

1. Harmonio inter Dio kaj homaro.
2. Instruo pri Dia Vero.
3. Fundamenta moralo.
4. Sankta karaktero de la misio.

### Principoj:

1. Pureco de animo kaj korpo.
2. Unuigo inter klasoj de la socio.
3. Optimismo pri la aranĝo de Dio.
4. Progreso por la socia plibonigo.



# OOMOTO INTERNACIA

MONATA ORGANO DE OOMOTO-MOVADO KAJ DE UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Jaro 11

Aprilo 1935

N-ro 4 (116)

Ĉefredaktoro: Koogecu NIŠIMURA.

Por ĉiu artikolo respondas la subskribinto.

Pri kotizoj ktp. legu la lastan paĝon.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Oomoto Centra Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

## Japano Naciismo kaj Esperanto

— Koogecu Nišimura —

Mi ne malkovros sekreton, se mi diros, ke en la nuntempa Japanujo naciismo faras grandan progreson. Temas tamen pri tute alia speco de naciismo ol la germana aŭ la itala. Eĉ se la Manĉuria Afero ne estus okazinta, Japanujo fariĝus naciisma pli-malpli frue, la eksiĝo el la Ligo de Nacioj nur plirapidigis tute naturan procedon.

Temas pri rekonsciĝo de l' japana raso. Ekscesoj povas okazi (kvankam ĝis nun ne okazis) sed la fundamenta ideo estas sana kaj aprobinda: la japana nacio estas egala al la plej kulturitaj nacioj kaj ĝi volas havi sian ĵustan pozicion en la mondo, proporcion al ĝia grandeco. Japanujo de nun pli kaj pli kontraŭstaros la arogantaĵojn de l' okcidentuloj kiuj, ho ve, tro ofte mistraktis japanojn kaj eĉ hodiaŭ estas leĝoj, en Usono kaj aliloke, pri kiuj mi preferas silenti.

En la pasinta duonjarcento Japanujo travivis senekzemplan periodon de «moderniĝo». En sia deziro sekvi la rekomendon de l' Imperiestro Meiji kelkaj generacioj de japanoj blinde adoradis ĉion kio estas fremda. Estis antaŭvideble, ke la afero ne povas por ĉiam daŭri!

En tiu periodo oni sukcesis tamen ellerni kaj apliki la tutan sciencon de l' blankuloj. Inĝenieroj, kuracistoj, matematikistoj ŝuldas

preskaŭ sian tutan konon al fremduloj. Vidante la bonegan rezultaton de sia lernado en sciencaj fakoj, la japanoj kompreneble deziris lerni aferojn kulturajn: artojn, lingvojn, muzikon, dancon, ktp. Mi devas konfesi, ke tie ili fiaskis. Ĉar kulturo ne estas imitebla: ĝi estas ennaskita aŭ propra al iu raso. Ĉu estas do mirinde, ke Nova Japanujo returnas sin al la kulturo japane-propra? La tuta naciisma movado en la politiko havas la supre-menciitan, sekretan motivon.

Tie ĉi interesas nin nur unu aspekto: la lingvolernado. Japanoj elektis la saman metodon por la lernado de fremdaj lingvoj, kiu donis bonajn rezultatojn ĉe la lernado de l' sciencoj: metodon logikan. Ĝi fiaskis. Post multaj jaroj de studado el dikaj, teoriaj volumoj, Japanujo ne sukcesis produkti aron da agrable parolantaj fremdlingvistoj. Ho ve, oni devas konfesi, ke eĉ skribe la japanaj «lingvistoj» ne estas elokventaj.

La kaŭzo de la fiasko ne estas nur la malboneco de la metodoj sed ankaŭ, eble eĉ pli altgrade, la malfacileco de l' fremdlingvoj por japanoj, kiuj vivas en la malproksima Oriento, kvazaŭ en aparta mondo. Eĉ Esperanto estas por ili pli malfacila ol por eŭropanoj sed tamen, la tempo bezonata

por ellerni la Internacian Lingvon estas dekfoje pli mallonga ol ekzemple la tempo necesa por la ellerno de la angla. En tiaj cirkonstancoj ĉu oni devas miri pri la rapida progreso de Esperanto en Japanujo? Tute ne! Kontraŭe, ni devas miri pri la *malrapideco* de ĝia progreso!!

Pli kaj pli la regantaj klasoj de Japanujo turniĝas kontraŭ la lernado de fremdaj lingvoj ĝenerale kaj la angla lingvo speciale. Jam dum la lasta jaro en kvar prefektejoj oni forigis la anglan lingvon el la programo de mezgradaj lernejoj kaj aliaj prefektejoj certe baldaŭ sekvos la ekzemplon. Fremdaj profesoroj de lingvoj ĉiujare malkreskas laŭ nombro, sekve la lingvolernado fariĝas eĉ pli teoria ol antaŭe. D-ro Mikami, parlamentano, antaŭ nelonge interpelaciis en la parlamento, postulante pli grandan honorigon al la nacia religio (ŝintoismo) kaj... forigon al la senutila lingvolernado el la lernejoj. Estas signo de l' tempoj, ke la eduka ministro varme aprobis lian paroladon.

Alia interesa simptomo estas la ĵus malsukcesinta konferenco inter japanaj kaj nederlandaj ŝipkompanioj en Kobe. La konferenco malsukcesis pro la lingva demando. La japanoj proponis la japanan lingvon kiel oficialan, la nederlandanoj proponis la anglan: tiam la japanoj respondis, ke la angla lingvo estas fremda al ambaŭ partioj, sekve ĝi ne taŭgas. Fine la nederlandanoj proponis, ke ambaŭ la angla kaj japana estu oficialaj kaj ili eĉ aldonis la holandan lingvon al la programo. Post kiam la japana flanko reĵetis tiun cetere nerealigeblan proponon, la holandanoj reveturis al Nederlanda Hindujo, de kie ili venis...

La leganto sendube demandos sin, kial oni ne mencias la nomon de Esperanto en tiaj favoraj cirkonstancoj, kiam la ĝenerala atento de la publiko direktiĝas al problemoj lingvaj kaj la atmosfero estas malfavora al fremdaj nacilingvoj. Nu, simple

pro tio, ĉar la nomo de nia lingvo estas kompromitita. Dum la periodo en kiu regis la t.n. «modernuloj» oni vaste propagandis nian lingvon en Japanujo akcentante ĝiajn internaciajn meritojn; multaj el la Esperantistaro estas aŭ estis konataj pro siaj liberalaj aŭ socialistaj opinioj kaj fine nia lingvo mem komencis esti suspektata.

Mi ne disputas la rajton de la «ruĝuloj» uzi nian lingvon: ĝi estas ĉies propraĵo. Sed ili ne rajtas surpreni la koloron de la sango sur la koloron de l' espero! Se ni havus kelkajn influajn anojn meze de la nun reganta klaso, meze de viroj seriozaj kaj aŭskultataj, kiuj detenas la potencon de l' ŝtato, la gazetaron, la banko-kofrojn, tiam nia lingvo povus facile triumfi en Japanujo rekonsciiĝanta pri sia nacieco. Laŭ la nuna stato tamen la verda stelo brilas tamen sur brustoj tre modestaj.

La «nuna stato» estas periodo transira. Jam prepariĝas en la fono la viroj kiuj ludos gravegan rolon en la historio de l' morgaŭa Japanujo, ja en la historio de l' mondo. Ni esperu, ke inter ili troviĝas almenaŭ kelkaj amikoj de nia lingvo. Unu viro influhava kaj decida valoras por nia movado pli ol tuta amaso da ridetantaj studentetoj, oficistoj, tramistoj aŭ spicistoj. Ĉiuj klasoj estas egale respektindaj kaj ĉiuj homoj egalaj laŭ vidpunkto de homaranismo sed klasoj kaj homoj ege diferencas laŭ vivpunktoj de reala politiko. Kaj nia lingvo venkos aŭ malvenkos laŭ reala politiko, ne laŭ revoj de malfortuloj. Ni esperu do, ke Esperanto penetros la rondojn de l' japanaj naciistoj. Ne nur ĝi utilos suprenlevi la nacian konscion ĉe japanoj sed certe ĝi donos al la naciistoj iom el tiu varma amo tuthomara sen kiu neniu lando povas esti «granda».





## PRI SEMADO KAJ RIKOLTO

S. K. Frant, Ĉeĥoslovakujo

«Kia la semado, tia la rikolto», tiel sonas malnova sed tre vera proverbo tut-eŭropa. —

Jes, kian oni antaŭe semis, tian oni povas atendi rikolton kaj postsekvon, kaj mi uzas tiun ĉi proverbon, por iomete diskuti pri la leĝo de la kaŭzeco, — la leĝo pri kaŭzoj kaj postsekvoj. —

Frato, kiu legas tiujn ĉi liniojn, observu foje bone la mondon, kiu ĉirkaŭas vin, por ke vi ekvidu, kio en ĝi nuntempe okazas; kial ĝi estas tiom mizera, tiom militema, tiom ekspluatema k.t.p. —

Rigardu per malfermita spirita okulo, observu kaj bone meditu pri la hodiaŭa konfuzo ne nur en unuopaj landoj kaj ŝtatoj, sed sur la tuta mondo, por ke vi ekspertu, kial tiu ĉi mondo, malgraŭ alta kulturo! (civilizacio), paŝas rapidege al abismo de l' pereco. Ne estas jam haltigeb-la la rado de l' sorto, kiun oni scipovis tiom fortege turnadi ĝisnun; ĝi devas tiom longe turniĝi, ĝis la forto de la inerteco tute eliĝis kaj malaperis.

Homfrato mia, mi demandas vin: Kia devis esti la semado, se la rikolto montriĝas kiel militemo, rabemo, ekspluatemo k.t.p.?! Kiaj devis esti la kaŭzoj, se la postsekvoj estas tiaj, je kiuj ni havas la honoron observi ilin?! La hodiaŭa scienco rezonas de la efikoj al la kaŭzoj, ne sciante, ke tiuj ĉi nevideblaj kaŭzoj estas nur la lastaj efikoj de la kaŭzoj kaj kaŭzetoj, kiuj antaŭiris, efikantaj la pormomentan postsekvon. Ĉiu penso, ĉiu vorto, ĉiu ago efikas en la spirita regno grandan eĥon, revenante al tiu, kiu ĝin sendis. En la lumo de tiuj vortoj vi povas facile ekkoni la profundan signifon de la diraĵo de Jezuo de Nazareto, kiu diris: «Ne tio, kio eniras en vi sed tio, kio eliras el vi, malpurigas vin.» — Se ekzemple malbona

estas la agado de la surteranoj, oni entute ne povas atendi bonan eĥon kiel postsekvon de tiu ĉi ago. Ĉar ĉiu ago, ĉu bona aŭ malbona, revenas al la sendinto kaj aginto, oni ne devas miri, se la homon kaj homaron renkontas malfeliĉoj dum tempo, en kiu ili ĝin entute ne atendas. — Se ekzemple vi estas la kaŭzinto de ies memmortigo, aŭ eble vi estas la mortiginto de iu ajn homo, venos certe la tempo, kiu reportos al vi la efikojn de via ago, kaj vi devas suferi, ne sciante pro kio. Sed sciu ankaŭ, ke via vivo daŭras kaj evoluadas poreterne kaj ne estas limigita de tiu ĉi surtera pensmaniero pri la naskiĝo kaj morto. —

Do, la finrezono de tiu ĉi meditado estas, ke oni rikoltas nur tion, kion oni antaŭe semis. — La tuta stato de la aferoj surtere, kiuj nuntempe montras sin al la observema okulo, estas nenio alia, ol la postsekvoj de milionoj kaj miliardoj da kaŭzoj, kaŭzitaj de la homoj mem. — Do, ĉio, kio renkontis kaj renkontos la homaron surtere, estas nur la efikoj kaŭzitaj jam antaŭe de ili.

Ĉion, kion ni antaŭe semos, tion ni poste rikoltos; kien vi direktos vian pensmanieron, tiudirekten kreskos la evoluo de la postsekvoj de tiu ĉi pensado. Se ekzemple la unuopa homo, same kiel la tuta homaro, pensos nenion alian, ol nur militemon, ekspluatemon, egoismon kaj avidemegon por la havaĵo de sia najbaro, la evoluo de tiu ĉi pensmaniero kreskos tiudirekten ĝis finfina efektivigo. — Tiu ĉi leĝo de la kaŭzeco efikas tiel precize, ke entute ne ekzistas mezurilo, per kiu oni povus mezuri tiun ĉi precizecon. — Sed se ni kontraŭe pensos en maniero bona kaj koincida kun la leĝoj de la absoluta bono kaj amo, oni certe povas kalkuli jam

antaŭe, ke tiu ĉi bona semo iufoje enradi-  
kiĝos, ekĝermos, ekkreskos, ekburĝonos  
kaj fine ekfloros, ĝojigante la seminton  
tiom, ke el tia sperto ekkreskos al li la  
forto de la saĝeco, per kiu li jam antaŭe  
ekkonas malbonecon kaj ĝiajn postsek-  
vojn, detruante en la lumo de tiu ĉi sperto  
ĉion, kio povus efiki malbonan postsek-  
von. —

«Ne ekzistas Dio.» diras la liberpensuloj :  
(materialismaj doktoroj, profesoroj, scien-  
cistoj k.t.p.) «Neniam Li povus toleri  
tiun ĉi malordon, se Li estus la justeco  
kaj la amo. — Ĉio fundas sur la funda-  
menta leĝo de la egoismo.» . . . Ne konante  
la leĝon, pri kiu mi ĉi tie skribas, ili  
rezonas tiamaniere, sed malĝuste kaj false.  
Oni ne povas postuli de la intelekto, ke  
ĝi lumigu al ili la profundajn leĝojn de  
la universo.

Sed aŭskultu, kion mi diros al vi :  
Nenia Dio povas bonfari kaj reharmonigi,  
kion la homo difektis; nur la falinta kaj  
nun *ekstere* (ekster la konscistato de la  
ĉiela konscio) sur la tero vivanta homo  
posedas la fortojn al la rekonstruo  
de tio, kion li antaŭ eonoj\* per la propra  
malbona kaj timema pensmaniero difektis . . .

Certe vi demandos min : Kial do Dio,  
la ĈIOPOVA, ne povas savi la homaron  
se Li estas la AMO? Jes, Dio estas la  
amo, sed Dio ne povas rompi sian leĝon  
pro la amo. LI estas ĉiopova nur en la  
kadro de sia leĝo, kaj perdas sian potencon,  
se la homo misuzas la dotitaĵon de la  
libera volo; kaj la homo surtere kontraŭ-  
agagas per sia egoismo al la volo de Dio,  
kiu estas nura amo kaj sinoferemo. — Ne  
devas vi opinii, ke Dio pensas same kiel  
la malgrandanima homo surtera; en Lia  
leĝo ĉio (penso, vorto kaj ago en la ĉiela  
konscistato) tuj efektiviĝas; ne ekzistas en  
la spirita regiono la surtera leĝo pri  
tempo kaj spaco.

\* esprimo por tempoj similaj al eterneco.

Nur se la homo montras la volon de la  
sinoferemo kaj amo, Dio povas sendi al li  
sian «Internofluon» kaj tiamaniere elsavi  
la homon kaj homaron. Tiu ĉi maniero de  
la elsavo estas kaj restas la unika kiu  
ekzistas. Pro tio devas efiki la rado de  
la sorto tiom longe, ĝis for- kaj eliĝis  
ĉiuj kaŭzoj kaj postsekvoj, turnantaj la  
radon; *la rado estas vi: ankaŭ la moviganto  
estas vi!* ĉu vi deziras ekscii, kiel ĉi tiu  
rado aspektas? Ĉi-sube la bildo montru  
al vi simbole, kion ĝi diras :



Vi mem estas la krucformo kun rompi-  
taj brakoj de la Dia volo, kiel montras la  
bildo; disigu horizontale ambaŭ viajn  
brakojn, por ke vi ekvidu vian propran  
krucformon. La rado turniĝas de supre  
al malsupre ĉirkaŭ sin mem, simbolante  
la turniĝeman sorton de la surtera homo  
el la konscistato de l' vivo al la konscis-  
tato de l' morto: (vivado surtera). Tiom  
longe turniĝas la rado, ĝis kiam la homo  
ekkonas la leĝon de la kaŭzeco, kiu kaŭzas  
lian sorton, — ĝis kiam li ekkonas, ke li  
mem estas la moviganto de tiu ĉi rado,  
kaj ke li mem posedas la forton, haltigi  
ĝin per la helpo de la Dia «internofluo»,  
tiamaniere rektigante ĝian sortoplenan  
turniĝemon. Rektiĝi ankaŭ devas la rom-  
pitaj brakoj de tiu ĉi rado; ili simbolas  
la rompitan Dian volon, pro kies malobeo  
la homo terenfaligis sin.

Fratoj kaj fratinoj miaj, kiuj estas serĉan-  
toj de la vereco pri la supre citita leĝo,  
sciu, ke mi diras tion al vi pro tio, por  
ke vi ekkonu vin mem kaj la propran sorton  
en la lumo de tiuj ĉi vortoj, efikante tuj  
post tiu ĉi momento vian propran pli  
bonan sorton, kaj turnante la kuradon de  
tiu ĉi sortorado al direkto, kiu respondas  
la leĝon de la ĉiela amo kaj absoluta  
bono. Se vi deziras, ke via vivo surtera  
estu lumigata de la lumo de l' suno,  
iĝonte sukcesoplana, vi devas nepre direkti



vian tutan vivtenon (pensadon, paroladon kaj agadon en direkton, kie lumas la suno de l' sukceso, ĝojo kaj bono. Se vi volas iĝi bona, direktu la radon de la sorto al la absoluta Dia boneco, kaj se vi volas iĝi malbona, vi devas nur direkti vian vivtenon al la direkto de la absoluta diabla malboneco. — Libera — tute libera — estas via volo; Dio devigas neniun! Libera estas via elekto! Sed ŝciu, ke unu el ambaŭ direktoj estas via sorto; aŭ esti forbruligita de la Dia fajro kaj lumo, por ke vi por eterne lumu en la ĝojego de Dio, — aŭ esti forputrigata de la diabla fajrego de la malamo kaj kolero. Se vi turnos vian vizaĝon al la Dia suno de l' lumo kaj ĝojego, via rado de l' sorto turniĝos post kelka tempo tiudirekten, ĝojigante vin finfine tiom, ke vi entute ne scias, kiel estis eble, kiamaniere la homo foje povis forgesi pri sia ĉiela deveno, kaj se vi forturnas la vizaĝon de tiu ĉi lumo al la surtera kaj postmorta mallumo kaj malbono, kun certeco vi jam antaŭe povas kalkuli pri via malbona sorto kaj postsekvo . . .

Mi diras al vi tiujn ĉi vortojn, por ke vi mem lernu direkti la radon de la sorto en direkton, kiel mi supre menciis, petante de Dio la «internofluon» kaj «justan gardodion», kiu transsendas kaj transdonas al vi tiun ĉi vivan akvon, same kiel la patrino la lakton el siaj mamoj al la propra suĉinfano . . .

Mi diras al vi ĉi tion, por ke vi ne atendu, ke aliaj homoj komencas agi en la bona senco. Komencu vi tuj, kaj postulu instruon de Sinjoro Onisabro DEGUĈI, se vi mem ne posedas la kuraĝon al la unua paŝo sur la «ĝusta vojo».

Mi diras al vi ĉi tiujn vortojn pro tio, ke vi ne estu perdita en la venontaj tagoj de la malordego kaj senleĝeco. Venos grandega surprizo, kiu ektimigos tiom la tutan homaron, ke ĝi preskaŭ pereos je timo antaŭ ol okazos la ĝusta

«rompo de la turo babela». —

Ne longe demandu, ĉu ĝusta la vojo estas, ĉar vi povus facile malfruiĝi. Se vi deziras certiĝi pri la venonta katastrofo, legu en la biblio sub la surskribo: «Detruo de Jerusalemo», kaj vi certiĝos, ke ĝi okazos baldaŭ en la venontaj jaroj.

Fine mi diras al vi ĉi tiujn vortojn, por ke vi ekkonu la profundan signifon de la vortoj: «Ne pli frue vi eniros en vian ĉielon, ol vi pagis vian lastan heleron\*.» Ankaŭ tiujn ĉi vortojn elparolis Jesuo de Nazareto antaŭ preskaŭ dumil jaroj. —

Ĉiu homo surtera devas pagi grandan ŝuldon, kiun li devas postlasi nur sur tiu ĉi tero, ĉar ĉi tie estas la destinita loko, kie oni havas la eblecon pagi siajn ŝuldojn . . .

Fratoj, rapidu, por ke vi ne falu de la arbo de l' vivo same kiel piro, en kies centro boras vermo de la malboneco, putrigante vin kaj viajn animajn fortojn, kiujn vi ricevis el la sino de Dio. — Rapidu, ĉar estas jam plej alta tempo. Neniu scias, kiam venos la tempo de la detruado; ne scias vi, ke la homaro troviĝas sur barelo plenigita per pulvo, kies meĉo jam brulas . . .

Dio benu vin survoje al LI!

\* Plej malgranda monero ĉeĥoslovaka kaj antaŭmondmilita.



**Ĉiu esperantisto, ano de Homaranismo, estu membro de Universala Homama Asocio kaj samtempe abonanto de ĝia oficiala internacia organo «Oomoto Internacia», tuj sendante la plej minimuman jarkotizon de 5 svisaj frankoj. Anticipan dankegon!!**

# Penu akiri Spiritan Panon

— Hidemaru DEGUŬI —

## FERVORECO\*

**S**OLE al fervoreco Dio respondas. Pri la neceseco de religio aŭ pri la graveco de Díoŝida trankvileco ade insistas tre multaj, ke tio estas la esenca principo de l' homa vivo, sed kiel malmultaj el ili fervore serĉas al si tion, kion ili nur gravigas! Kiel multaj vivas maltrankvile kaj katenas sian altan animon al oro, gloro kaj honoro — bagateloj en la lumo de la eterna vivo! Kiel malmultaj scias salti trans la limojn de ilia malvasta medio por atingi super ili novajn horizontojn de la vasta kaj libera mondo! Al homo sen buŝo oni ne povas altrudi manĝaĵojn kaj pano buŝon ne serĉas. Kun fermitaj la okuloj oni ne povas vidi. Kiuj nur fervore serĉas al si Dion fine sukcesas Lin senti. Vana estas la prediko pri Dio al homoj, kiuj senzorge formanĝas la vivon en ĉiutaga nenifarado (ne temas pri riĉuloj aŭ potenculoj, sed pri tiuj, kiuj malmulte suferas aŭ ĉagreniĝas en la spirita flanko de l' vivo). Al homoj sensuferaj kaj senĉagrenaj mankas ja fervoreco de la vivo. Kiu ne havas fervorecon sukcesas elfari nenion vere indan kaj jam ne parolante pri perfektigo de Dikredo.

El la supra konstato mi povas diri, ke malfeliĉaj estas tiuj, kiuj estas denaske en favoraj cirkonstancoj en materia flanko!

## INTIMECO

Kiuj flatemas al superaj personoj estas ĝenerale malfacilaj al malsuperuloj. Miela

\* La japana vorto 眞剣 (ŝinken) estas laŭlitere «vera glavo» aŭ «vera spado». El tiu sama vorto devenas ankaŭ la senco de fervoreco, seriozeco, entuziasmeo, strebo, sed la plej ĝusta senco estas la **korstreĉiteco** dum oni batalas duele per veraj glavoj. Faru laboron kun tia streĉiteco, kian oni havas riskante vivon en batalo — tio estas unu el la Oomoto-maksimoj.

intimeco ofte ŝanĝiĝas en malamikan interrilaton. De l' antikveco oni diras, ke *la interrilato inter granduloj (saĝuloj) estas ĉiam freŝa kiel akvo*. Al eksteruloj ŝajnas ne tre intima la amikeco inter ili, sed ilia amikeco estas eterna, ĉar ili sin bone komprenas per internaj sentoj. Kiuj alproksimiĝas al profito, disiĝas ankaŭ al profito.

Muteca kontakto inter amikoj aŭ najbaroj ofte kaŭzas malamikan miskomprenon unu sur alian, dum tio neniom gravas en okazo inter samfamilianoj — gepatroj, gefiloj ktp. Familianoj povas sinteni tre libere kaj senĝene kaj inter ili regas nenia ombro de suspektemo. Tamen en okazo de amikoj aŭ najbaroj, ili emas sin gardi, sin deteni kun deca penso, ke unu ne miskomprenu la alian. Eĉ ilia gesto aŭ parolo ofte ĵetas nigran ombron de suspektemo inter ili. Ĉi-rilate la infanoj estas laŭdindaj! Ili neniom timas, ĉar ili nenion ambicias. Ĉar ili estas naivaj, ili ne scias afekti, nek suspekti aliajn.

Kiuj entenas en sia koro sekretojn aŭ malfortajn punktojn naskas en si mallumajn iluziojn de diablo, de kiuj ili devas esti konstante minacataj kaj timigataj, ĝuste kiel la proverbo diras, «Suspektemo naskas monstrajn fantomojn».

Sendemande pri inteligenteco, aŭ instruiteco, la homoj, kiuj donas agrablan senton kaj kun kiuj oni povas rilatiĝi per libera koro — kaj ju pli oni amikiĝas kun ili, des pli oni sentas intimecon kun ili — estas bonaj homoj en la vera senco de la vorto.

## DILIGENTECO

Kelkaj malŝatas laboron tial, ĉar ili pensas, ke kiom da laboro estas tiom da perdo. Tio estas tamen miskompreno. El ĉiu laboro estas spirita profito, se oni plenumas taskon per fervoreco. La koncepto pri





Familio de S-ro Hidemaru Deguĉi

laboro kiel ia perdo, devenas de l' materialisma pensmaniero. Ekzemple pro sia laboro oni ja devas tiom pli cerbumi, malsatiĝi kaj perdi energion. Tamen la cerba laciĝo forviŝiĝas per iom da ripozo kaj malsatemo eĉ donas bonan apetiton kaj tiom pli da freŝa energio. Oni akiras spiritan forton (kapablon), se oni lernas unu laboron. Ankoraŭ pli grandega estas la profito, se oni lernas universalan lecionon el tiu simpla laboro!

Kiuj ne komprenas la supran motivon evitas laboron kaj volas resti ne aktive. Tamen la *internofluo* de Dio ne enkondukiĝas en la homon escepte dum kiam li okupiĝas en iu ajn laboro per fervoreco. Impertinentaj estas tiuj personoj, kiuj volas atingi sen piediro kaj saĝiĝi sen lernado.

Spinoza fondis sian grandan filozofion dum sia laboro. Kompreneble nia mondo ankoraŭ ne estas ideala, nek perfekta. Kaj ne ĉiuj laboroj de l' mondo konformas al niaj idealoj. Tial ni ne bezonas kateniĝi sub la jugo de nia laboro, ni submetu nian laboron kun granda kaj vasta koro. Plej necese estas, ke ni klopoĉu krei nian

propran spiritan medion kaj intereson dum nia laboro. Kun tia korteno oni povos ricevi la favoron de Dio — en kiu ajn laboro oni okupiĝas! Dank' al Dia favoro, nia animo pli kaj pli grandiĝas. En la fizika flanko, per diversaj manĝaĵoj kaj per korpa ekzercado la homoj pli kaj pli grandiĝas (kreskas). En la spirita flanko la homoj ricevas la lumon de Dio dum ili praktikas ian laboron kaj tiamaniere ili grandiĝas sian animon. El la materia mondo oni ricevas liveron de nutraĵoj por la fizikaj korpoj. La spiritajn nutraĵojn oni ricevas el la Spirita Mondo. La materia mondo estas la mondo de *formoj*, sekve la evoluado aŭ kreskado de l' homaj korpoj estas ja limigitaj. Sed la Mondo de Spirito estas la vera Reala Mondo, en kiu ĉio estas senlima.

Homoj estas malperfektaj en la okuloj de Dio. Ili estu modestaj en sia koro kaj lernu kiel eble plej multe el ĉiuj aferoj de la vivo, kaj tiamaniere ili plenumu sian mision kiel la servantoj al Dio. Tio estas la sola rimedo, kiu donas al la homoj spiritan forton kaj kapablon.

*Trad. T. Nakamura*

## Filozofio de Vivo

Havu la kuraĝon obei al la interna voĉo en via koro. Interna krio en la koro nostalgie aspiras al la Vojo eterna, ĉar la homa naturo inkliniĝas al Dio!

Helpante kaj helpate ni kunprosperas en paco kaj plezuro.

Amu homojn kaj amata estos vi; se estos male, amo mankas al vi.

Dio loĝas en ties koro, kiu amas aliajn kiel sin mem.

— Hidemaru DEGUĈI —

***Oriente Filozofio\****

(3)

— *Jamato Masaharu* —***La Antikva Scienco de l' Oriento***

La nuntempaj orientanoj, en sia fervora studado pri la moderna scienco okcidenta, forgesas pri la ekzisto de antikva scienco orienta. Mi ne pretendas, ke tiu antikva scienco egalvaloras la modernan laŭ vidpunkto *praktika*, sed mi asertas, ke ĝi estas treege atentinda el kultura vidpunkto. Efektive, multaj rezultatoj de l' antikva scio koincidas kun la instruoj de l' natursciencoj eŭropaj. Se oni konsideras la fakton, ke la antikvaj saĝuloj akiris sian konon pli per meditado ol per observado, oni devas miri pri ilia saĝego. En la sekvaj paragrafoj mi nur donos kelkajn ekzemplojn por ilustrati la supran tezon. Mi ne povas eniri pli profunde en la temon pro tio, ke mi mem ne posedas sufiĉe grandan konon de ambaŭ antikva kaj moderna sciencoj, nek mi rajtas supozi tian profundegecon flanke de la legataro. Ni tamen faru nian eblon rilate al klarigo kaj kompreno!

***Antikva Biologio***


Biologio estas la scienco de la vivo. La modernaj biologoj sekcias kadavrojn t.e. korpojn senvivajn sed la antikvaj saĝuloj preferis observi vivantajn estaĵojn (sekciado estis malpermesita). Modernuloj ridetas pri la «naiveco» de l' antikvuloj, tamen, signo de l' tempoj!, pli kaj pli oni protestas kontraŭ vivsekcio eĉ en rondoj sciencaj. Oni komencas rekoni, ke mortigo kaj turmento al vivantaĵoj estas senutila kaj barbara. Baldaŭ oni komprenos, ke oni vane serĉas la vivon sur kadavro senviva!

En Antikva Biologio oni ne havas apartajn principojn kiel en moderna Biologio: la samaj leĝoj kiuj regas la materian mon-

don ankaŭ regas la biologian mondon. La ĉefa principo estas denove *inologia\**: here-deco, evolucio, lukto por la vivo, ktp. originas finfine en la jam konata principo de *IN* kaj *YO*.

Dank' al sia simpleco, la Orienta Biologio evitas la paradoksojn en kiujn falas la moderna scienco pro siaj rigidaj konkludoj. Bona ekzemplo estas la rizo. Laŭ moderna botaniko ĝermo ne prosperas sub akvo. Fakte tamen, la rizo, per kiu sin nutras la tuta Oriento, ne povas prosperi alimaniere ol sub akvo. Laŭ la okcidenta scio kreskaĵo ne prosperas sen suna energio. En Japanujo tamen milionoj nutras sin per maraj algoj kiuj kreskas en profundegaj akvoj kien neniu sunradio penetras. La okcidenta scienculo estas perpleksa sed la *inologo* scias, ke ĉiu vivantaĵo estas naskita kaj nutrata de sia medio tute egale ĉu ĝi estas tero, akvo, suno aŭ alia.

Biologio estas cetere la scienco en kiu la funkciado de *IN* kaj *YO* estas okulfrapa. Ĉu estas bezone fingre-montri la inan kaj ulan ovon? Ĉiu scias, ke homo mem estas la rezultato de renkontiĝo inter spermato (t.e. «vira naskiga fluidaĵo» laŭ P.V. aŭ *YO*) kaj ovulo (t.e. *IN*). Oni prezentas tion en *Inologio\** tiamaniere:



Ĉi tio estas principo kaj simbolo ĉion-enhavanta.

Geografoj rimarkas, ke apud la maro naskiĝas pli da knabinoj ol knaboj kaj reciproke, en montaraj regionoj ofte mankas virinoj. La *inologo* bone scias la kialon: akvo estas *IN*, monto *YO*: medio naskas vivantaĵojn kaj nutras ĝin...

\* Vidu O.I. Jan., Marto.

\* Ĉina scienco de «*IN* kaj *YO*».



La leganto komencas suspekti, ke la antikvuloj sciis pli ol multaj modernuloj.

### **Orienta Medicino**

La eŭropanoj interesiĝas pri orienta medicino: en diversaj libroj oni legas ŝercajn priskribojn pri ĉinaj medikamentoj. Oni forgesas tamen, ke la ĉefa celo de l' orienta medicino ne estas kuracado sed malhelpo al malsaniĝo!

Tute same estas pri spiritualismaj doktrinoj kiuj kuracas per mirakloj. Oni emas forgesi, ke la ĉefa celo de iu spiritualisma doktrino estas malhelpi ke malsano okazu. La okcidenta proverbo «sana korpo, sana animo» estas do renversigata en la Oriento. Tie ĉi oni klarigas ĉion *anime*. Eĉ hodiaŭ, kuracistoj en Ĉinujo estas pagataj dum la «paciento» estas en bona sano: la pago ĉesas tamen dum malsano. Ne estas mirinde, ke la meza aĝo de l' homo estas plej alta en Ĉinujo... malgraŭ ĉiuj higienaj malsufiĉecoj!

Entute, multaj supozitaj «stultaĵoj» de la Oriento enkaŝas profundan saĝon. Bona ekzemplo estas la sekva rakonto pri la ĥolero en Kantono, en 1895:

«La aŭtoritatuloj terurigitaj de l' epidemio dekretis, ke la kalendaro devas esti malantaŭen-ŝovata je 3 monatoj. La celo de tiu ĉi dekreto estis *trompi* la spiriton de l' epidemio, kiu regule venas somere. Vidante, ke ankoraŭ estas «printempo» certe la diabla malsano reiros al la nordo!» (raporto de eŭropa kuracisto).

Interese, ĉu ne? Jes kaj krome estas du interesaj faktoj: Unue, la epidemio fakte haltis post la kalendara ŝanĝo kaj due, la kaŭzo estas tute simpla: ŝanĝo de dieto kiu dependas de l' kalendaro!

Por malhelpi malsaniĝon la orienta kuracisto multe zorgas pri la dieto. Laŭ la *inologio* homo devas esti nutrata de la ĉirkaŭaĵo en kiu li loĝas, sekve li devas manĝi la produktojn de sia naskiĝloko. En nia mondo se malracia nutrado per konservajoj

venantaj de l' antipodoj, ĉu oni devas miri pri la eksterordinara nombro de stomakmalsaniĝoj?

Oni riproĉas al la antikvaj receptoj (troveblaj en ĉinaj libroj) ilian malekzaktecon kvantan kaj oni laŭdas la precizecon de l' moderna kuraca ĥemio. Oni eraregas. Ĉar ne ekzistas «la pleŭrito». Ekzistas tiom da malsamaj pleŭritoj kiom da individuaj malsaniĝoj, pli-malpli similaj al t.n. pleŭrito abstraktigita (la aŭtoro de tiu ĉi artikoloj antaŭ ne longe havis pleŭriton sed sen febro, fakto kiu tute mirigis kuraciston!). La kvanto kaj la kunmeto de l' medikamentoj devas do esti funkcio de l' preciza diagnostiko en ĉiu individua kazo. Pro tio la Antikva Kuracarto estas pli arto ol scienco; t.e. oni bezonas ennaskitan talenton por ĝin majstri — ĉar per la nura intelekto eĉ tuta vivo da studado ne sufiĉus por ellerni ĝiajn fundamentajn principojn.

(*daŭrigota*)



**Ĉiu Espisto estas bonvena!**

*Por atentiĝi preterirantajn fremdajn ĝesamideanojn kaj bonveniĝi ilin s-ro Bertil Zell, Genevad, Svedujo starigis tiun elpendaĵon kun la skribo: «Ĉi tie loĝas delegito de U.E.A.».*

# Vortoj de Prezidanto de Sinseikai, Sinjoro Onisabro Deguči

(4)

## La koro de heroo

La koro de heroo akceptas ĉion egale, ne distingante tion de ĉi tio. Ĝi estas tolerema kiel la granda maro, kiu bonvenigas ĉiujn riverojn, ĉu purajn ĉu kotajn. La fido de la popolo koncentriĝas al persono, grandskala, senlima, kies veran figuron oni ne povas facile koncepti.

## Iom pli luma mondo

La senluma mondo aŭ la fina mondo, nomita de antikvaj profetoj, ja estas la mondo, kie la materio regas la homan animon. Almenaŭ iom pli luma mondo! Kiel mi ĝin sopiras senpacience! Necesas tamen nur ke la popoloj vekigu je la Granda Vojo unuiganta la religion kaj la politikon, por ke la morgaŭan tagon la mondo subite ekbrilu.

## Liberiĝu de memo-penso

Neniu estas tiel granda, kiel homo liberigita de memo-penso. La perfektan ekzemplon ni vidas en Nanŝu Saigo\*. Okaze de la milito kontraŭ la ŝtata armeo — kiam li estis sur la forkura vojo el ĝia ĉirkaŭado, li momenton haltigis la veturilon por rigardi la batalejon kaj ĝojis dirante «Tre bone, ke la Japana armeo tiom progresis». Poste en plena kontento kaj trankvilo li donis la finon al sia vivo.

## Konstitucio kaj politika partio

En la Japana konstitucio nenie estas rekonite pri politikaj partioj. Do senbaze estas, ke la adeptoj de politikaj partioj ĉiam mencias la «kutiman vojon de la konstitu-

cia politiko\*\*». La nuntempaj politikaj partioj estas nur kuniĝoj faritaj de la egoismaj intereso kaj sentimentoj, sekve ankaŭ facile disigotaj de la samaj kaŭzoj.

## Adam Smith

Venita de la ekonomiaj teorioj de Adam Smith, la tuta mondo nun perfekte venis al la «dronado en marĉo». Imitante la okcidentajn landojn, kiuj agonias en la fundo de abismo, nia regantaro nature pretigas la saman sorton al nia lando. Se oni ne rapidas fundamente restarigi la ekonomian mekanismon per penetra kompreno de la ideoj de nia *Koodoo*-ekonomio, malbeninda afero povas eksplodi en ĉiu minuto, kvankam oni ne scias, en kia formo. Tute facile oni povas kompreni la *Koodoo*-ekonomion, nur se oni sin turnos al ĝi kun cerbo senantaŭjuĝa, kiel blanka papero, foriginte ĉiujn ĝisnunajn konojn pri la ekonomio. Ve al la japanoj, precipe la inteligentuloj, kies ĝenerala emo estas malfaciligi facilan aferon.

## Kalkulo kaj ekonomio

Nun en nia lando troviĝas neniu instruitulo nek politikisto, kiu scias la diferencon inter kalkulo kaj ekonomio. «Unu *yen* kaj du *yen* faras tri *yen*. Trioble tri *yen* estas naŭ *yen*. Dividante dek *yen*, oni ricevas du kvin *yen*.» Tio estas nur kalkulo, la ekonomio ne estas tia negativa afero. Semi unu grenon kaj rikolti dek mil, jen estas la vera spirito de ekonomio.

## Homa boneco

Estis kiam mi estis deksep jara. Mia

\* Ĉefa figuro inter la laborintoj por la nacia resarigo de Meiji-epoko (1867). Li tamen poste rezignis la ŝtatan oficon kaj pro malpaco kun tiam registaro kaj pro aliaj kaŭzoj li estis devigata, malgraŭvole kontraŭi la ŝtatan armeon.

\*\* Laŭ ĝi oni pensas, ke kiam registaro bazita sur unu partio rezignas, la opozicia devas ricevi la ordonon de fondo de nova registaro.

patro praktikis pomalgrandan vendadon de saŭco flanke de agrikulturado. En ĉiu monatfino oni iris al la klientaj domoj por kolekti la pagojn, kaj kelkfoje la patro sendis min por tiu tasko. Al iu domo mi iris por ricevi la krediton, kiu sumis nur kvindek *sen*. Tiam la domomastro tre ĝentile petis min prokrasti ankoraŭ kelkajn tagojn, ĉar li estis en malbonaj cirkonstancoj en tiu tago. Kelkajn tagojn poste mi denove iris al la domo. La sinjorino malfermetis la pordon al la najbara ĉambro kaj tien ŝi ion flustris. El la ĉambro mi aŭdis rekoneblan voĉon de la mastro, kiu diris: «Petu lin foriri dirante ke mi forestas». La sinjorino timeme petis al mi: «Bonvolu veni alian tagon, ĉar hodiaŭ forestas la edzo». Mi do rimarkigis, ke mi aŭdas la voĉon de la mastro. La sinjorino kun embarasita mieno eniris la najbaran ĉambron por komuniki mian vorton kaj tiam la edzo laŭte ekparolis: «Se la mastro mem proprabuŝe diras, ke li forestas, kio povas esti pli certa certigo?!» Mi komprenis kaj returniĝis. Post tio la trian tagon la mastro mem venis al mia domo dirante: «Pardonu mian malbonon de la pasinta tago. Ne pretiginte la monon malgraŭ la promeso, mi ne povis renkonti vin kaj mi kuraĝis mensogi asertante mian foreston. Hodiaŭ mi akiris monon kaj venis por pagi kaj peti pardonon». Forte impresita mi tiam estis pri la aprioria boneco de homa naturo kaj samtempe pri la malfeliĉa homa mondo, kiu eĉ necesigas mensogon laŭ okazo.

### Vivanta kateto kaj mortinta leono

Budao, Kristo, Mohameto, Konfucio — ĉi tiuj estas certegrandegaj figuroj brilantaj en la homara historio, kiel fondintoj de religioj, kaj tamen nun, kiam pasis jam du miljaroj, ili havas neniom da kapablo nin gvidi kaj savi — ĉar ili estas ja mortintaj. En la nuna tempo ili ne povas eĉ levi ŝtoneton. Ol mortinta leono, pli kapabla

kaj utila estas vivanta kateto. Vivanta kateto facile povas mordi kaj turmenti mortintan leonon. Utile tamen estas legi pri skribojn pri iliaj vivoj kaj vortoj kaj fari ilin modeloj por nia ĉiutaga vivado aŭ nia psika hardado, imagante la ekstreman fortecon de iliaj voloĵoj. Preĝi al ili por plenumo de deziroj estas malsaĝe kaj superstiĉe.

### Miraklaj fenomenoj

Inter la diversaj miraklaj fenomenoj eĉ mi okazantaj la plej facile videbla al ordinaraĵoj estas tio, ke mi neniam, eĉ ne unu fojon, renkontis pluvon dum vojaĝo en la lastaj tridek sep jaroj post mia sindediĉo al Dia Vojo. Ĉiam estis perfekte serena vetero kaj se malofte pluvetis, tio okazis nur dum mia restado en vagono aŭ dum dormado. Mi dankas por la granda amo de dioj, kiuj tiel kompleze ĉiam zorgas ĉirkaŭ mi.

### Mi konstruos novan Nipponlandon

Mi sentas min multe kuraĝigita trovante ke la pensoj de la nuntempaj herooj, kiel Kemal Pasha, Mussolini, Hitler k.a. tre similas al tiuj, kiujn mi jam de longe en mi tenas. Nepre mi konstruos novan Nipponlandon. Mi ne faras nepagotan kambion, kiel aliaj movadogvidantoj. Mi nepre realigos, kion mi unu fojon eldiris — per fortika organizo, potenca propagando kaj per agado bazita sur la justeco.

### Detruita patrujo

La tielnomataj modernaj instruituloj tute difektis nian sanktan Dilandon, Nipponlandon buŝe kaj plume per naivaj okcidentaj pensoj, kies sklavoj ili estas. Ĝin revenigi al la vera stato ankaŭ per buŝo kaj plumo, jen estas unu el la taskoj de *Sinseikai*, kiu necesigas grandan kuraĝon. Kvankam Nipponlando jam de antikve sin nomas «Lando sen babilo» kaj la principo de la nacioj estas «agi anstataŭ blagi», tamen antaŭ tiel mizere detruita patrujo mi ne povas resti silenta.



**El mizera strateto**

Antaŭ pompa pordego svarmas sentaŭguloj, el mizera strateto ofte aperas hardita lojalulo.

**Plej necesaj sintenoj**

Genuiĝi sub la Plej Granda, esti modesta antaŭ la Ĉiopova, karesiĝi en la amo senfina, ĉi tiuj estas la plej necesaj sintenoj, kiuj vere indigas la homan vivon.

**Du ekstremoj**

La malforta punkto de iu homo estas

samtémpe lia forta punkto, kaj la forta punkto estas nenio alia ol la malforta. Inter avantaĝo kaj malavantaĝo tiel nomataj apenaŭ troviĝas diferenco de la hareta dikeco. La virtulo similas malsaĝulon dum en ŝajna idioto oni ofte trovas veran saĝulon. Ankaŭ nedistingeblaj estas ekstremaj bonulo kaj malbonulo. La ekstremo de oriento unuiĝas al tiu de okcidento, la fino de tago estas la komenco de nokto kaj renverse.

(Trad. N. Ito)

( F i n o )

## SPIRITO FLUGANTA

(*Mia sperto dum korespondado kun germanino*)

— Nakamura-Hisao —

Oni jam scias ke la homo estas kuniĝo de la spirito kaj korpo, kaj ke la spirito, havanta specialan karakteron, faras alian funkcion kompare kun la fizika korpo. Pri tiaj problemoj jam detale klarigas kelkaj Oomoto-literaturoj, ekz. «Kio estas Oomoto?», «Fundamento de Animo», ktp. Por montri al niaj legantoj mirindan funkcion de la homa spirito mi skribos jene interesan rakonton, kiun mi spertis lastatempe dum korespondado kun germanino.

Jam de kelkaj jaroj mi estas Esperantisto kaj havas sufiĉajn gekorespondantojn en eksterlando. Inter ili estas germanino s-ino Margaret (en Pufflingen), unu el la plej intimaj amikinoj. Ŝi estas ano de *Neugeist*, famekonata Nov-spirita movado. Laŭ miaj leteroj ŝi sciigis ke mi estas Oomotano, laboroferanta en la Loka Centro de Oomoto-movado, en Hokkaido. Kaj ni ofte interkomunikadis pri niaj ŝatataj temoj, ekz. la spirita problemo, la homa vivo, ktp.

Estis la frua somero de la lasta jaro. Iun tagon mi aŭdis jenan ŝajne strangan rakonton de s-ro K. Ootani\*, direktoro de

nia Loka Centro: «Kelkaj spiritoj akompanas vin. Unu el ili estas spirito de eŭropanino, kaj ĝi (la spirito) instruas al via spirito diversajn eŭropajn aferojn kaj tre gaje laboras kun vi... En unu tago ĝi venis al mia spirito kaj rakontis al mi ke ŝi estis anglino antaŭe kaj tamen nun vivas en Germanujo...»

Li diris multajn klarigojn ankoraŭ, sed ial la lasta punkto forte kaptis mian atenton. Ĝis tiam mi neniam legis en ŝiaj leteroj pri tiu afero, sed lia klarigo pri ŝia aspekto k.c. centprocente koincidis kun ŝia portreto, sendita antaŭ longe, tiel ke mi jam ne povis dubi la fakton.

Por pli certigi la aferon mi demandis s-ron Ootani, kial ĝi akompanas min. Li klarigis, ke la homa spirito povas tuj alflugi kien ajn, kiam la homo profunde pripensas (aŭ meditas) pri iu loko aŭ pri iu persono, kaj kredeble ŝi havas al mi specialan impreson kaj agrablan senton laŭ korespondado.

Mirigita de lia rakonto mi skribis al s-ino M. la 14an de septembro. Informante la detalojn pri supreskribitaj aferoj mi kuraĝis ankaŭ skribi al ŝi: «... Do al mi ŝajnas ke tiu eŭropanino devas esti nenio alia ol vi, kara M., kvankam mi havas kelkajn

\* li estas tre fervora Oomoto-propagandisto kaj havas sennombrajn spertojn pri spirita problemo. Li jam ofte vidas diversajn spirit-fenomenojn dank' al lia akra «anim-  
mo-okulo».



Sino Margaret

korespondantinojn. Mi tamen ne tre gravigas la aferon, nur por kaŭzi al vi intereson mi skribas tion kiel etan epizodon . . .»

Nun, en la 17a de novembro mi ricevis sian respondon (datitan 25. okt.), el kiu mi transskribas kelkajn partojn. (Por eviti eventualan miskomprenon, la teksto estas originala. N-H)

«Mi rapidas respondi al via valora letero kun mia elkora danko. Ĝuste en la sama tago (14. 9. 34) mi ankaŭ skribis al vi antaŭan leteron. Do niaj leteroj renkontis sin reciproke! Via lasta letero, kara amiko, min tute interesis. Mi kredas ke ni reciproke bone komprenas. Mi devas rakonti al vi, ke depost jaroj mi min okupadas

kun la spirita mondo. Ĉiuvespere mi havas mian «trankvilan horon»; kiam mi vivas tute en la spirita mondo, estas tre mirinde. Mi tre ĝojas, ke vi laboradas kune kun s-ro Ootani. Li montras al vi spiritajn vojojn. Jes, mia karega Hisao, la spirita flanko estas multe pli profunda ol la materia. Nun mi iom skribos al vi pri mia persono kaj mia opinio, ĉar vi devas profunde kompreni min. Dank' al mia studo pri la spirita mondo mi jam sciis, ke mi estis anglino en antaŭvivo, sed nuntempe germanino. Ĉu vi komprenas ĉi tion? Mi kredas, ke s-ro Ootani helpos vin. *Vole nevole mia animo ŝvebas al Japanujo por trovi vin . . . . .*»

Dank' al Oomoto-libroj, delonge mi jam kredas ke ekzistas la homa spirito kaj ankaŭ la spirita mondo, kiu allaboras al la reala mondo. Tamen nun per mia propra sperto ĉi-foja mi povis klare kompreni la fakton nerefuteblan. Aliparte admireginda estas tiel forta spirit-kapablo de s-ro Ootani. Mi povas diri, ke tio estas nenio alia ol la meritita rezultato de lia alta di-kredo kaj samtempe energia studado de la «Rakontoj el la Spirita Mondo», verkita de nia Majstro Onisabro Deguĉi.

## <sup>A</sup> <sup>A</sup> *Cehaj Aforismoj*

«La celo de la vivo estas sinperfektigado.»

Vojta NAPRSTEK

«Kiu ne ĝuis feliĉon ĉe la patrino, eĉ se li estus reĝo, li ne konas feliĉon.»

HALEK

«La muziko estas lango de niaj sentoj, vorto de niaj pensoj.»

Bedrich SMETANA

«Kiam la homo estas malfeliĉa, ĉiu amika vorto kvazaŭ balzamo por la vundita animo kaj la konsolo estas pli valora ol mono, proponita de indifera koro.»

Bozena NEMCOVA

«Kiamaniere la homo uzas sian liberan tempon kaj kiajn amuzojn li elektas — tio plej bone parolas, kia li estas.»

MASARYK

«Kiam ajn ni venkis, ni plej ofte venkis per supereco de la spirito, sed neniam per perforto.»

Fr. PALACKY

«La bonon oni ne akiras per perforto, la malbonon oni ne forigas per malbono; la pacon kaj liberecon oni ne akiras per teroro, sed per la amo.»

J. WURMOPA

# La Nacia Karaktero de l' Japana Popolo

— Njozekan Hasegawa —

*Njozekan estas plum-nomo de Manjiro Hasegawa. Li estas veterana ĵurnalisto kaj kritikisto pri sociaj kaj politikaj problemoj.*

La RED

\*

**I**NTERESO en priskribado pri nacia karaktero de l' japanoj kaj ilia kulturo naskis du opiniojn tiel apartajn, ke se unu estas la tuta vero, alia devas esti falsa. Unu opinio estas, ke la japanoj posedas esence unikan mensan formon, kiu distingis ilin de ĉiu alia popolo; la alia estas, ke ĉiuj iliaj sciaĵoj havas fremdajn devenojn, ke ilia kulturo estas sinteza akirado, en kiu ĉio ajn pure japana en la malhela pasinteco, ĉesis plu teni signifon. La subtenantoj de la unua kutimas supozi, ke la karakterizoj de l' japanoj havas nenion komunan kun tiuj de aliaj nacioj kaj floras en kultura medio malakorda kun fremdaj civilizoj. Japano estas japano, ili asertas, kredante ke tio estas sufiĉa kaj memevidenta deklaro. Kiuj havas la duan opinion forpelas per svingo de mano ĉion, kio pretendas esti pure japana, speciale en la kultura sfero, kiel delikatan produktajn de imagado kaj direktas sian atenton sole al la influoj venintaj al Japanujo en diversaj periodoj de historio el aliaj landoj, dumtempe miksiĝante en tion, ili pretendas, kio hodiaŭ estas la karaktero de la japana nacio. Estas notinde, ke tiu ĉi opinio estas favorata de tiuj kiuj alproksimiĝas al la japana civilizo el la starpunkto de materialismo. La antaŭa estas komuna al tiuj, kiuj en siaj observoj estas gvidataj de konsidero al tio, kion ili nomas «la japana spirito».

La civilizo de kiu ajn lando formiĝas kaj koloriĝas per ĝia nacia karaktero, kaj la nacia karaktero determiniĝas per ĉirkaŭaj

kaj sociaj kondiĉoj. La nacia karaktero neniel povas esti absoluta kaj rigida. Kvankam ĝi tendencas ekskludi fremdajn kaj novaĵojn, ĝuste kiel faras la naturo de individuo, tamen ĝi ankaŭ tendencas ĉirkaŭpremi ilin. Tiuj ĉi tendencoj ekzistas flank-ĉe-flanke, unu forturniĝante de ekstera influo kaj alia turniĝante al ĝi. Se la unua estas pli forta, la nacio fariĝas konservativa; se la lasta superas, la nacio estas progresema. La normala homo, kiel ajn li volus resti ĉe si mem, estas socia estaĵo kun almenaŭ iom da socia adaptebleco. En la kazo de nacio, socia ekskluzivemo al naciismo. Dum nacio vivas en izoleco, kiel estis Japanujo dum pli ol 200 jaroj, ĝi estas evidente ne aktiva partoprenanto en internaciaj aferoj kaj verŝajne havas nenian (kompare) nacian mem-konsciencon. Lasu ĝin malfermi la pordojn, kaj tiam ĝi montros inklinon asociiĝi kun aliaj landoj kaj rivali ilin en diversaj kampoj, kvankam samtempe ĝia memkonscienco kiel nacio vekigiĝas emante al ekskluzivemo. Kiuj dediĉas plejan atenton al la vekigo de nacia memkonscio inklinas emfazi la originecon kaj unikecon de japana kulturo, dum kiuj estas impresitaj ĉefe de elmontroj de internacia kooperado nature tendencas akcenti la efektojn de fremdaj influoj al Japanujo.


Neniu el ambaŭ grupoj, unu pretendanta ke la japana kulturo estas indiĝena kaj pura, aŭ alia insistanta, ke ĝi estas la produkto de enfiltraĵo, vidas pli malproksimen ol unuflanko de la ŝildo. Nur estas juste diri, ke la civilizo de Japanujo ricevis influon de fremdaj kulturoj en la sama maniero kiel la kulturoj de eŭropaj landoj, sed ankaŭ estas rekoneble, ke ĝi



retenis multon el la tradicioj. Krome, por adopti variajn aspektojn de okcidentaj civilizoj la nacio estis tre rapida, montante la fortan temperamenton al internacia societemo. Sendube tiu ĉi temperamento estas pli forta ol tiu de eŭropaj nacioj, kvankam Japanujo, malsimile al ili, ne havis dum multaj jarcentoj komunan borderon kun alia lando. Ŝajnus esti eĉ licenco por la aserto, ke la japana nacia karaktero inklinas al rivaleco de aliaj pli ol, al enfermigo en ĝiaj malnovaj limoj, kvankam estas abundo da evidenteco, ke ĝi ne rezignis la tradiciojn. La japanoj utiligis sian inklinon por imitado — por evoluigi tion, kio estas esence en ili mem. Nur popolo de forta karaktero kapablas tion. Anstataŭ perdi sian individuecon sub la jugo de fremdaj ideoj, ili kapablis fortigi ĝin per kontrolo al la cirkonstancoj, sub kiuj la fremdaj ideoj ensorbiĝis. En retenado ĉe sia originala karaktero kaj en akiro de plifortigiloj el aliaj, en ambaŭ kazoj la japanoj superas.

Pretendo, ke la japanoj havas fortajn inklinojn al tiuj ĉi du ekstremoj, donus la impreson, ke ili estas nacio de ekstremistoj. Tio ĉi tamen ne pravas. Troviĝas individuaj ekstremistoj kaj limigitaj grupoj kiuj inklinas tro foren en unu direkton aŭ alian, sed la nacio kiel tuto sukcesis gardante la «oran mezon», dank' al la reciproka detenemo kiun la du ekstremoj praktikis. Por klarigi ilian nacian karakteron, oni ne devas ignori tiun ĉi gravan kvaliton.

Antaŭ longa tempo en la historio, en la Nara- kaj la Heian-periodoj (710-793 kaj 794-1192), la japanoj manifestis sian dualan kapablon por konservi la propran esencon kaj ensorbi la fremdan. Kvankam multaj inteligentuloj emas konkludi, ke la prapatroj de la modernaj japanoj simple imitis la ĉinojn dum la suprediritaj periodoj, tamen esploro pravas konsiderindan evidentecon, ke ili havis rimarkindan temperamenton



Meiji ŝinto-sanktejo por la Granda Imperiestro Meiji, en Tokio.

por konservado de sia individueco. La maniero laŭ kiu ili enportis literaturon el Ĉinujo oferas bonan bildon por tion kompreni. Por enporti fremdan kulturon, la kutima paŝo antaŭ ĉio estas parola kaj skriba lernado de la lingvo de l' koncernata kulturo por faciligi la procedon. Kiam eŭropo estis sub la influo de Roma civilizo, la latina lingvo regis ĉie kiel oficiala, akademia, religia kaj eĉ socia lingvo. Konataj pro siaj fortaj naciemoj, eĉ la germanoj mem, oni diras, skribis ĉion gravan en latina aŭ franca lingvo ĝis Kanto kaj aliaj rompis la precedencon.

Ĝis enkonduko de la ĉinaj skribsignoj, Japanujo ne havis skriban lingvon.\* Tiuj fariĝis la sola medio de skribado, ĝuste kiel la latina lingvo estis en eŭropo. Tamen estas notinde, ke la ĉina lingvo neniam estis parolata en Japanujo, kaj la skribsignoj neniam legataj ĉin-maniere. Ili estis utiligataj por la japanaj vortoj, kaj ilia aranĝmaniero en skribado estis ŝanĝita konforme al japana gramatiko. Tiu ĉi inventemo estas verŝajne sen paralelo en la mondo. La legado al ĉina literaturo ne enkondukis novan literaturan stilon, kvankam en postaj periodoj evoluis kio nomiĝas nun «la traduka stilo». Malgraŭ ke la ĉinaj skribsignoj estis uzataj por skribado, la japana lingvo restis

\* antikvaj propraj skribsignoj ekzistis. — Noto de l' Trad.

familiara, kiel oni vidas en la *Kojiki*, la plej malnova historio (kompilita per la ordono de la Imperia Kortego), kiu en ĉiuj aliaj punktoj estis imitema ĉinajn kutimojn. Ankaŭ notinda estas la uzo de la ĉinaj skribsignoj deper japanoj antaŭ jarcentoj, kiel ne nur ideografioj tiamaniere, ke la ĉinoj uzas ilin, sed kiel ankaŭ fonetikaj simboloj por reprezenti la japanlingvajn sonojn, kiel montriĝas en la *Manjосу*, plej malnova antologio de l' japana poezio. Tiuj prapatroj elmontris tro multe da motivoj por akuzo, ke ili estas simple imitemaj.

Plie adoptante la skriban lingvon de Ĉinujo, ili estis pli karakterizaj ol oni ĝenerale kredas. Ekzemple, el la *Libro de Odoj* ili elektis skribsignon, kiun la ĉinoj neniam uzis por reprezenti la japanan vorton *uŭasa*. Ili faris tian klopodon, ĉar *uŭasa* signifas ne nur famo, klaĉo aŭ onidiro, sed ankaŭ babilado, malbonaj vortoj eldiritaj pri aliaj, kiuj forestas, ktp. Por termino de tia variriĉa signifo la ĉinoj ne havis por ĝenerala uzo skribsignon, adoptindan de japanoj kaj la japanoj devis sin turni al antikvaj klasikaĵoj de Ĉinujo por tio, kion ili bezonis.

Estas nerefuteble, ke estis granda fido al la ĉinoj kaj koreoj, kiuj naturaligis en Japanujo en la adopto-laboro de ĉina civilizo, en politiko, literaturo aŭ arkitekturo, sed eĉ en tiel frua epoko kiel dum la Regenteco de Princo Ŝotoku (593-620), kiam imitado de kio ajn ĉina estis la modo,

la japana senso pri belo manifestiĝis en la arkitekturo de esence ĉinaj strukturoj, kiel ekzemple Hoorjuuĵi, budaisma templo en Nara, kiun, oni diras, desegnis la Princo Ŝotoku mem. Tiu ĉi detenemo de ŝinto-arkitekturaj elementoj en konstruaĵoj, inspiritaj per fervorega entuziasmo al ĉina stilo provizas alian bildon por tio: kiel forte la japanoj estis inklinaj ĉiam al ambaŭ konservativismo kaj progresemo!

Ĝuste kiel simpleco regis en frua japana arkitekturo, kun linioj rektaj anstataŭ kurbaj kiel en la ĉina arkitekturo, naturalismo distingis la antikvan literaturon de Japanujo, en kontrasto kun la nomantikismo, kiu signis la mitojn de aliaj orientaj landoj kaj tiujn de la Okcidento. Eĉ pritraktante la mitologiajn okazaĵojn, la *Kojiki* estas realisma laŭ stilo. Realismo apartenas kun la simpleco en la arkitekturo de Ŝinto-sankejoj kaj la literatura signifo de Ŝinto-ritoj, al la listo de la japanaj karakterizoj, kiuj ne submergiĝis per fremdaj influoj.

En la okcidentaj landoj, la pastraro posedis tian potencon, ke *Church of Rome* estis ne nur internacia organizo laŭnome, sed eĉ havis grandan aŭtoritaton super la ŝtatoj mem. Ankaŭ Japanujo travivis similan situacion en la jaroj post la enkonduko de Budaismo, sed la principo de *Ŝtato super Eklezio*, kiu nur en modernaj tempoj estas rekonitaj en eŭropo, establiĝis en tiel frua periodo, en kiu Ŭake-no-Kijomaro forpelis Dokjo, la fama bonzo deveninta de la Imperia Kortego. Novaĵo estis bezonata, sed ĝi ne devas tro malhelpi malnovaĵon.

Kun tuta konservativismo kaj konservemo al sia individueco, la japanaj prapatroj estis sendube pli radikalaj ol kiu ajn alia popolo en adoptado de ĉiuspecaj fremdaj institucioj. Ambaŭ Princo Nakano-Oje kaj Huĵiŭara-Kamatari, la du gvidantoj plej prirespondaj pro la Reformo de Taika (646), studis sub la gvido de japaniĝinta



La budaisma templo Hoorjuuĵi,  
en Jamato provinco.

klerulo nomata Nanjen, kaj iliaj idealoj estis nature «fremdecaj». Rapidaj estis la ŝanĝoj kiujn ili faris por centri la registaron kaj kontroli la provincan aristokration. Sekvante la ĉinan ekzemplon tamen, ili ne estis simple imitemaj. Tiutempe estis situacio, kiu bezonis korekton, kaj en la ĉina ekzemplo ili vidis solvrimedon.

La Restarigo de Meiji unusence estis ripetigo de la Reformo de Taika, en ambaŭ periodoj manifestiĝis konservativa naciismo kaj liberalisma preteco por ensorbi fremdan kulturon. En la fruaj tagoj de Meiji superregis naciismo, ĉar ĝi estis bezonata por nuligi la lokalizitajn feŭdalajn instituciojn kaj por unuigi la popolon, sed baldaŭ sekvis la rapida vekigo de forta liberalismo por adaptigi Japanujon al moderna civilizo kaj internacia kapitalismo. Kiam ajn tamen ekstrema naciismo priokupis, ĝi estis apenaŭ akompanata de iometo da malklera kontraŭ-fremdismo. Kia ekzistis ĝis nun faris nenian efektivan influon al la fluo de japana historio. Tiu ĉi kompara mankeco de kontraŭ-fremdismo ankaŭ povus aldoniĝi al la listo de japanaj karakterizoj.

Eĉ la lastatempa naciismo, kiu ŝajnus malprogresema ĉar ĝi deklaras, ke ĝi ampleksas la principojn de «Malnova Ŝintoismo», estas realisma aŭ naturalisma, ne romantika. La pionira elmontranto de «Malnova Ŝintoismo», Norinaga Motoori, iam kritikis ĉinan militiston en desegnaĵo, ke li pli bone aspektas kiel monstro, ol kiel soldato. Kiel ajn brava li estus, li diris, li devus aspekti pli homeca. Tiu ĉi iniciato de «Revenu al la Antikveco» estis moderna kaj realisma en lia tuta perspektivo. Acutane Hirata, konservativa obstinulo, kiu ofte estis kritikata kiel degenerinta Norinaga Motoori, ne hezitis fari elciton el fremdaj libroj por klarigi la geografiajn avantaĝojn de Japanujo en la *Ĝeneralaj Principoj de la Antikva Vojo*. Li estis ankaŭ sufiĉe moderna skribanto en

facila konversacia japanlingvo kaj prelegante al ordinaruloj dum la feŭdaj tagoj, kiam lernado estis propraĵo nur de privilegiaj klasoj.

La ĉefa fluo de japana penso, kiel ajn konservativa ĝi estis, ĉiam estis realisma en spirito kaj neniam apartiĝis de objektivaj cirkonstancoj. Al tiu ĉi praktika naturo de la popolo estas multe atribuebla la evoluo de la nacio. Kvankam ofte dediĉigintaj al superstiĉo, la japanoj ne havis metafizikojn, popularan aŭ akademian, pro kio ili devas esti dankemaj pli ol bedaŭraj kiel kelkaj el ili ŝajnas esti. Ilia praktika naturo ebligis al ilia kulturo kontinuan evoluon, sen interrompoj komunaj al la landoj en centra Azio. Ili havis bonan fortunon ne dorlotiĝi en idealismaj ekstravagancoj kiel la greka mistikismo kaj la hindaj metafizikoj, kiuj estis simple spritaj senutilaĵoj, kaj ŝparintaj kulturajn ornamaĵojn de tiu ĉi speco ili tiom pli bone povis antaŭenmarŝi kiel nacio. La fakto, ke la antikva literaturo de Japanujo produktis naturalisman verkon kiel *Genji Monogatari*, kapablanta eksciti la intereson ĉe okcidentaj legantoj eĉ en la moderna epoko, estas nur unu el multaj indikoj de la esenca naturo de la popolo — la naturo kiu ĉiam estis la bazo de ilia evoluo kaj progreso.

Hodiaŭ, kiam la japanoj estas granda popolo kaj ludas elstaran rolon en la progresigo de l' homaro, ne estas mirinde, ke ilia civilizo estas pli internacia kaj pli parenca al Okcidenta kulturo, ol iam ajn antaŭe. La okcidentanoj bedaŭrus, ke Japanujo estas rapide perdanta la eksterajn elmontrojn de sia malnova kulturo, kaj la Departemento de Turisma Industrio intencus priskribi la landon per vortoj de *ukijoe* aŭ *kabuki*. Tamen estas senutile, peni malhelpi la popolon sekvi sian propran linion de nacia progreso.

Tamen estas konfesinde, ke Japanujo ankoraŭ devas okupiĝi en memekzameno, sed tio estas pli direktinda al la flanko de



ilia konservativismo, ol al tiu de ilia progresemo. La mempretendemo de la nacio por deteni sin mem kontraŭ fremdaj landoj ne devas malhelpi pluan evoluon deper internacia kooperado. Eĉ dum la longaj jaroj de izoliteco, la japanoj tenis sin tre bone flanko-ĉe-flanko kun ĉina kulturo. Ne estis dorlotiĝo en idealismo aŭ abstrakta kontraŭfremdismo senkonsidera al aktualaĵoj. La fakto, ke ili ĉiam, eĉ en la periodoj de krizo por sekurigi sin kiel nacion, estis volontaj serĉi materialojn por nacia evoluo en sia kontakto kun fremdaj landoj, anstataŭ retiriĝi en spiritualisma mallibereco de ili propre farita, tendencis liveri eraregan impreson, ke ili estas blindaj admirantoj de fremdaj aferoj kaj manieroj. Sendube manko de rasa antaŭjuĝo inter la japana popolo estas kulpa por tiu ĉi miskompreno, sed estas tiu manko, kiu kontribuas al nacia progreso.

Diri, ke mem-ekzameno estas necesa ĉe la flanko de nacia Konservativismo ne signifas, ke tio estas neniom necesa ĉe la

flanko de progresemo. Diversaj fazoj de urba kaj komerca civilizoj kaj lastatempaj tendencoj en popularaj amuzoj, kiuj montras ke tro multe da maldeco kaj vulgareco estis ensorbitaj el okcidenta modernismo, bezonas esti rebonigitaj. La japanaj prapatroj prenis nur kremon de l' ĉina kulturo kaj ili sukcesis produkti altnivelan civilizon per siaj fremdaj pruntaĵoj. La hodiaŭaj japanoj ankoraŭ ne povas fieri pri iu granda atingo komparebla al tio, kion ili heredis.

Ankaŭ en politikoj estas granda bezono de pripensado, precipe ĉar certaj nacioj ŝajnas inklini por imiti tion, kio estas okazanta en la lando, kiu estas en la plej malfavorata pozicio en Eŭropo. Klare elmontri la meritojn de la japana nacia karaktero kiel montrita en la historio estos rekte utile al la japanoj mem same kiel al fremduloj interesigantaj pri Japanujo kaj ĝia popolo.

*El «Contemporary Japan» (Revuo de Japanaj Aferoj) Trad. N. TAZUO*



Gustigo per teo kaj kuko, en japana ĉambro.

# JAPANUJO

(El «*Vojaĝlibro*» de Filozofa) (6)

— H. Keyserling —

## KIOTO (2)

En la plej altaj sferoj de antikva Japanujo, internaj dekoracioj kaj virinaj kostumoj variis laŭ la alternado de l' sezonoj. Neniu ĉambro iam estis harmoniigita al somero kiam neĝis kaj tempestis ekstere, neniua vera damo de Japanujo estus iam portinta vestaĵon sugestantan krizantemojn en la sezono kiam glicinioj floris. Estas la sama ideo, kiel la ĉina «harmonio», nur ĝi estas esprimita tie ĉi, ne profunde, sed supraĵe, samkiel la pentristo kaptas kaj reproduktas la signifon de aĵoj en liaj «koloraj reflektaj» (Goethe). La japanoj ne multe okupiĝis pri la ĉielo; sed anstataŭ tio, dank' al ilia mirinda natursento, faris paradizon sur tiu ĉi tero. Mi povas bone imagi, ke nanigita arbo ne sentas sin malbontraktita kiel arbo tranĉita laŭ la franca maniero certe sentos: ĝi eĉ verŝajne sentos dankemon al la ĝardenisto, ĉar li ŝanĝis ĝian naturon sen perforto, tiel ke ĝi ŝajnas esti tute en harmonio al la ĉirkaŭaĵo. Ĉiuokaze, ĉiu homo havanta bonan guston, al kiu la sama afero okazus, estus dankema.

La «signifo» de tiu ĉi natursento, kiel dirus Laoĉe, estas la baza noto de ĉiu azia filozofio pri la mondo kaj vivo. La hindoj esprimis ĝin en siaj filozofio, religio kaj muziko, la ĉinoj en la tuto de sia kulturo, la japanoj, ĉefe, en la formado de tio, kio estas videbla; en tiu ĉi rilato ili estas tute Azianoj. La tuta Oriento konsideras la homon kiel parton de l' naturo kaj ĝi kondukas konforme, dum estas karakterize pri ni, ke ni neas nian membrecon. Estas sendube, ke la orienta vidpunkto estas pli profunda. Ĉion-enfermanta religio-filozofio nenion neanta nur povas naskiĝi el la azia konduto rilate al la mondo, ĝi sola ebligas perfektan socian organizon en principo;

nur homo havanta azian mondsenton posedos guston en la plej alta senco. Ĉar kio estas gusto se ne plej klara konscio pri proporcio? La homo, kies okuloj estis dressataj en Japanujo, nur malofte bezonos ilin malfermi en Eŭropo. Kiel barbara estas nia troŝarĝa kutimo! Kiel malofte objekto staras en la loko, kiun la ĉirkaŭaĵo postulas! Kiel okulfrapaj estas niaj objektoj! Kaj kiel malofte eŭropano scias, ke ĉambro ekzistas por la homo kaj ne reciproke, ke li, kaj ne kurteno aŭ pentraĵo devas troviĝi en la kiel eble plej bona loko! Tial, eĉ la japana arkitekturo atingas ion pli valoran ol nia moderna konstrumetodo, ne gravas kiom malmultsignifaj estas iliaj kreaĵoj kompare al la niaj. Japana templo estas planita kun sia ĉirkaŭaĵo, fakte ili ne povas esti dissociitaj. Kaj ĉar ĉio ĉi estas farata majstre, kaj ĉar ĉiu konstruaĵo prezentas unuecon kun sia fono, la ĝenerala aspekto estas estetike pli kontentiga, ol niaj konstruaĵoj, kiuj estas plejparte pli bonaj en si mem. Estas karakterize, ke la japanoj perdas sian guston tuj post la alpreno de eŭropaj manieroj kaj eŭropaj vestaĵoj: ili estas fremdaj al ilia interna naturo, ili ne povas kompreni ilin en ilia propra interrilato. Kaj same estas multsignife, ke la temploj estas ĝenerale troŝarĝitaj: ili ne estas por homoj, sed por superaj estaĵoj pri kiuj oni ne havas klaran bildon. Sekve oni vizitadas ilin nur je festaj okazoj, kiam la ekzaltita atmosfero ĉiuokaze postulas pli pompajn kadrojn. Hodiaŭ mi ĉeestis la japanan feston de templo Niŝi-Honganĵi. Tie oni elmontris la plej eksterordinaran pompon. Sed estas ĝuste tiel, ke — laŭ la japana vidpunkto — religiaj festoj devas esti — esence eksterordinaraj spektakloj — kaj la abunde dekoritaj, ore brilaj kaj gaje

lakumitaj temploj prezentas kadrojn havantajn vere taŭgan stilon por tiaj okazaĵoj. Sed la japana ĝardeno estas absolute bela, ĝi estas la perfekte bela ĝardeno, esprimo de ne malpli klasika spirito ol la grekaj bildoj pri dioj. Kial la japanoj nanigas arbojn? Ne pro prefero al tio, kio estas malgranda en si mem, sed, ke la plej eta peco da tero elmontru infinitan perspektivon, simile al pejzaĝo de Millet. Sed kiam estas abunda spaco, kiel en la Imperia Parko de Kioto, la arboj en la fono estas permesataj preskaŭ tuŝi la ĉielon, kaj ilia kresko-impulso nur estas limigata laŭ la proporcio de l' distanco al la fono, tiel, ke la sama bildo de infinita distanco estas kreita larĝskale, kiun la malriĉulo kreas en miniaturo. Kaj kiom senfine pli oni povas atingi per inteligenta penetro en la strukturon de l' naturo ol per ĝia perforto! Per kelkaj ŝtonoj, malmultaj plantoj kaj rivereto, la artisto vokas belecojn en la indiferentan spacon, kiajn oni ne povas trovi en multaj famaj urbegoj... Dum mi ripozas en tiuj ĉi magiaj ĝardenoj en la varmaj horoj de l' tago, mi legas el la *Genji-Monogatari*, tiu mezepoka romano, kiu donas tiel perfektan bildon pri la vivo de l' princoj en Japanujo: tiun ĉi kvaliton de rafino neniu kortego en la Okcidento konis; nek, verŝajne, iu kortego en Ĉinujo. Tio, kio karakterizas tiun ĉi kulturon, estas rilato, kiu estis nur ebla en Japanujo: inter la besteca intuicio pri sensaj fenomenoj kaj ilia ekstreme arta ellaboro. Kiam princo Genji ĝuis la atmosferon de lunluma sceno, li ne revadis kiel Persa poeto: li estis atentema kiel rabobesto embuske kuŝanta, sed li sentis tion, kion li observis, samtempe kiel delikatsensa estetikulo.

\* \* \*

La ĉarmo de tiu ĉi estetike plej altira lando envolvas min pli kaj pli. Tie ĉi, la objektoj de l' ekstera mondo ekposedas min, kiel aliloke ideoj en la sfero de pensado, kaj ili modulas la atmosferon de mia animo ĝis ĝi komponas tute nature laŭ ilia kleo.

Ĉu mi sentas min ĉiutage pli juna ĉar mi estas en Japanujo? Tio estas verŝajne la kaŭzo. Ni naskiĝas en la mondo, por tiu ĉi mondo, por la ekspluatado, ne por la rezignado al teraj eblecoj, kaj se ni volas vivi je tro frua stadio super la regiono de l' sensoj, ni devos penti. Kiam la vivo estas atinginta sian teran zeniton, ĝi plenumiĝas pli kaj pli en pure mensa ekzisto. Dum la kurbo surtera estas ankoraŭ ascensia, la sensoj nekontraŭstareble postulas sian rajton. La naturprocezoj ne permesas, ke oni mallongigu ilin.

\* \* \*

Sed ĉi tio ne estas la sola, ne la ĉefa kaŭzo, kiu plialtigas tiel grave la tonon de mia vivo en Japanujo: estas la nekomparebla kontentiĝo kiun oferas al oni vivo en kaj kun la sensoj en la lando de la Leviĝanta Suno. Tie ĉi, kiel nenie aliloke surtere, eksteraĵoj estas agorditaj al internaĵoj. Naturo al la homoj, tiel ke la eblaj impresoj posedas de la komenco harmonian rilaton al la eblaj sentoj; kaj tie ĉi, kiel nenie aliloke, tiu ĉi harmonia rilato estas realigata laŭ la plej bona objektiva ritmo. La nombro de tiaj ritmoj ne estas senlimaj: tute same kiel kombinoj de elementoj kondukas al konstantaj ĥemiaj kombinaĵoj nur laŭ difinite limigitaj nombroj, same kiel la ĉielaj korpoj povas esti grupigataj nur subjekte al certaj rilatoj de pezo kaj reciproka distanco, tiel same la maksimuma beleco, kontentiĝo kaj feliĉeco ankaŭ dependas de certaj ritmaj rilatoj. En la objektiva arto, speciale en muziko, tiu ĉi aferstato povas esti facile elmontrata: ju pli klasika estas iu komponaĵo, des pli ĝi ŝajnas esti kontrolata de l' ekzaktaj ritmoj kiuj, ekster la regiono de l' ĉielo, kontrolas la harmonion de l' sferoj. En la kazo de subjektivaj sentoj, tamen, kie objektiva pruvo ne povas esti menciata, ĉiu kies organismo estas sufiĉe delikata havos la saman personan sperton. Mi konas neniun kiu kvankam penetranta en la ritman gimnastikon de




Jacques-Dalcroze tamen ne spertis per kaj en ĝi nekredeblan altigon al vivo: tiu ĉi gimnastiko realigas la objektivan optimumon\* en la ritmo de l' homa gesto-funkciado. Mi konas neniun artspiritan personon al kiu la beleco de iu majstroverko ne aperas kiel absoluta objektiveco. Kaj, lastvice sed ne malgrave, la feliĉeco kiun du homoj povas doni unu al la alia dependas, en ĉiuj okazoj, de la grado de ilia psikologia kaj psika simpatio, tio estas, ĝi dependas de la rilato laŭ kiu la kordoj de ilia naturo harmoniadas. En ĝuste la sama senco, la rilato laŭ kiu la objektiva kulturo en Japanujo staras al la homa subjektiveco estas la plej bona ebla rilato. Nature, oni devas fariĝi mem japano por sperti tiun ĉi optimumon plene; sed en Japanujo oni vere fariĝas japano; neniu asimilema menso povas fuĝi tiun ĉi transformiĝon.

Kaj se li tiam rimarkas, ke la fremda Ekstremorienta manifestiĝo ekaperas, eĉ al li, kiel objektiva optimumo, tiuokaze li ankaŭ komprenos kiom malmulte tiu ĉi stilo signifas kiel tia. Estas la rilatoj interne de l' konvencioj kiuj feliĉigas lin; la samaj rilatoj povus esti ankaŭ reprezentataj en la greka lingvo aŭ formo. Kaj la fakto ke en Japanujo li ĝuas plej multe tion kio estas japana, nur pravas kiel tre taŭga estas tiu ĉi speciala stilo al la *ambiente*\*\*.

Miaj pensoj retro-migras al Ĉinujo. Nun, la perfekto kiun mi havas antaŭ la okuloj de mia menso hodiaŭ estas speciale japana, ne ĉina, kaj eĉ se ĉiu individua manifestiĝo estis inventita en la Meza Regno; la rutino de tiu ĉi vivo estas bazita sur konsiderado; sed ĝi estas esprimata en obeemo al la objektivaj formoj de ĝentileco, sendepende de tio kio povus okazi en la konscio de aliujoj. Oni rakontis al mi la historion de ĉina sinjorino kiu vizitis eŭropaninon, kiun ŝi malfavore impresis ĉar, anstataŭ kliniĝi al ŝi, ŝi turnis sian ĝentilecon en la kon-

traŭan direkton, montrante sian dorson al la gastigantino dumtempe: la gastigantino devus, laŭ la etiketo, stari je la kontraŭa (suda) flanko de l' ĉambro; la fakto ke ŝi ne staris tie en la efektiveco estis indiferentaĵo por la ĉina sinjorino. En Japanujo estas ĝuste la vivanta konsiderado kiu estas ekstreme evoluiginta; nenie aliloke sur la tero la sentemeco ŝajnas esti tiel delikate nuancigita. Tial, la ĉina invento produktas sian plej noblan floron nur tie ĉi. En Japanujo la ideo de l' harmonio estas enkorpigita en la moviĝemo de l' vivanta apero; nenio okazas, krom laŭ harmoniaj proporcioj, nenio okupas iun pozicion krom la plej ritmo-plenan. Konsekvence oni sentas sin bona kaj feliĉa kien ajn oni iras. Post ĉio, la plejparto de l' aferoj en la tuta mondo dependas de bagatelaĵoj. Nur unu nuanco diferencigas sentaktecon de takto, unu nuanco dividas ĝentilecon de aroganteco. La japano posedas la plej evoluigintan senson



Pendbranĉa ĉerizfloro en ĉirkaŭaĵo de Heian-Sanktejo, en Kioto.

\* botanika termino: tiu temperaturo de kiu vegetala vivo plej bone prosperas.

\*\* latina: ĉirkaŭaĵo.

por bagatelaĵoj. Tial, post kiam tio kio estas granda estis donata al li, li kapablis plenumi rezultatojn kiuj estis neatingeblaj al pli granda estaĵo.

La kontraŭo de ĉi ĉio — sed mi ne volas fuŝi mian staton de feliĉeco. Kial posedus homo aŭ popolo ĉiujn avantaĝojn? La nacioj de tiu ĉi tero kompletigas unu la aliajn. Iuj ludas la bason, la aliaj la sopranon; malmultuloj ekfrapas la basajn tonojn, multaj aliaj kantas la melodion. La homaro estas orkestro konsistanta el multaj voĉoj; la filozofo aŭskultas la simfonion. Kaj se li devas veturadi en la spaco por ricevi la impreson de unueco, tio ĉi implicas ne pli da serioza kontraŭdiro al la ordo de l' mondo ol la fakto ke la unueco de ĉiu aparta melodio estas nur realigata en la daŭro de l' tempo. (Daŭrigota)

## Jamato=(japana)=Spirito


Al Lia Trono  
Brilanta kiel suno  
Jamato-gento  
Jam donas sian vivon  
Por ke Li ĝin disponu.

Ni devas esti  
Mortpretaj kiel ŝildoj  
De l' Trono Sankta  
En nom' Jamato-vira  
Kuraĝa kaj bravega.

Ni decas kiel  
Soldatoj de l' Mikado!  
Kaj sen bedaŭro  
Animon oferante  
Plenumas devon gloran.

De Kuumei Kotaki

(Japana poemeto «Waka»  
31 silaba = 5-7-5-7-7)



## Al Vi Karaj...

Ricevinte bonvolajn subskribojn de Parizaj samideanoj, inter kiuj troviĝas tre amikaj nomoj, mia koro jam eksaltas kaj volas reviziti tiun belegan kaj neforgeseblan urbegon kaj miksiĝi inter la Agapaj konatuloj, kiuj ĉiam sin montris tre afablaj al la sola kaj soleca orientano dum tiom longaj jaroj.

Mi tutkore salutas ilin kaj sendas ĉiujn bondezirojn kaj esperas ke ili havos multan feliĉon kaj pompan estontecon en nia komuna afero.

Koogecu Niŝimura

## Juĝo per Sonorilego

(Ĉina legendo)

En iu urbo de Ĉinujo loĝis juĝisto, kiu nomiĝis *Ĉinjo*. Li havis tre mirindan talenton en juĝafero. Antaŭ *Ĉinjo* neniu povis sukcesi kaŝadi sian kulpon, ĉar li havis tiel akran penetremon. Li estis genia por eltrovi krimulon kaj lia juĝmetodo estis sprita kiel tiu de *Ooka-Eĉizen\** en Japanujo.

Unu tagon urbano vizitis lin kaj diris. — «Estimata Sinjoro, hodiaŭ matene ŝtelisto forprenis multe da mono kaj mebloj el mia domo. Bonvolu aresti la friponon. Se oni lasus lin libera, la urbanoj ne povus vivi trankvile.» *Ĉinjo* senprokraste dissendis siajn ŝubulojn en la urbon por aresti la friponon. Pasis du tagoj. Ili arestis kaj kunportis al la tribunalo sep personojn tre suspektindajn. Do inter sep arestitoj devas esti unu vera fripono. Kiu estas vera krimulo el ili? Estas malfacile! Per kia metodo la juĝisto elserĉu la ŝteliston? Tra la urbo oni scivolemis kaj atendis la juĝon.

*Ĉinjo* tuj alvenigis antaŭ si sep arestitojn kaj alparolis ilin kun milda mieno eĉ mont-rante bonhumorecon sur la lipoj. — «De nun mi juĝos vin, sed antaŭ tio mi montros tre strangan objekton al vi, jen...» Li elprenis sonorilegon el la skatolo, kiu kuŝis sur la tablo ĉe lia flanko. Ĝi estis sufiĉe rustiĝinta kaj malnoviĝinta sonorilego, 30 c.m. alta. La juĝisto diris, — «Ĝi estas sonorilego de iu templo kaj ĝi havas magian povon. Se iu, kiu havas eĉ iom da kulpo, tuŝos la sonorilegon, ĝi tuj resonos grand-eĉe. Mi do ordonas al vi, ke vi ĉiuj laŭvice tuŝu la sonorilegon!».

Ĉar tiutempe oni ankoraŭ ne estis tiel

kulturita kiel en niaj tagoj, kaj la ĉinoj estis kredemaj pri superstiĉoj, neniu el la arestitoj dubis la vortojn de *Ĉinjo*. Li kunportis la sonorilegon en alian malluman ĉambron kaj kondukis la arestitojn unu post alia en tiun ĉambron, por ke ili tuŝu la sonorilegon. La tuta afero finiĝis, tamen la sonorilego neniom resonis. Nun *Ĉinjo*

postulis ke ili montru al li siajn manojn. Li atente esploris ĉiujn dekkvar manojn unu post la alia — jen lia rigardo subite fiksiĝis al unu viro. La juĝisto faris akran demandon al li!

«Ĉu vi tuŝis la sonorilegon?»

«Jes, Sinjoro!»

«Jes? Vi tuŝis?» — liaj okuloj ekbrilis. «Ne mensogu! Mi vidas, ke vi ne tuŝis la sonorilegon. Ĉu vi ankoraŭ pretendas, ke vi tuŝis la sonorilegon?»

«Ne, s-ro juĝisto, mi ne tuŝis. Pardonon!» — li kliniĝis.

«Vi ne kuraĝis tuŝi la sonorilegon pro la timo de ĝia resonado! Bone mi verdiktas, ke vi estas krimulo.»

*Ĉinjo* tuj malliberigis lin kaj senkulpigis la aliajn.

La fakto estas, ke sur tuta surfaco de l' sonorilego, *Ĉinjo* ŝmiris nigraĵon. Tial, kiuj tuŝis la sonorilegon devis makuliĝi je la manoj. La vera fripono ne kuraĝis tuŝi la sonorilegon pro konscienca admono, sekve nur liaj manoj restis senmakulaj, dum la aliaj manoj makuliĝis.

(T. Kamimura)



\* Tre fame konata antikva juĝisto en Japanujo. En iu sekvonta numero ni aperigos la rakonton pri lia juĝo.





# La Grafologio.

— De W. Veith —

La grafologio estas same kiel fiziognomiko tre bona rimeĉo por studi la karakteron de homoj. Estas ne eble kaj ankaŭ ne necese, instrui pri tiu ĉi arto en tiu ĉi artikolo, precipe, ĉar ja ekzistas jam de longe amaso da libroj pri ĝi. Mia tasko estas nur atentigi ĉiujn legantojn pri tio: la grafologio povas kaŭzi grandan malagrablaĵon, eĉ malfeliĉon, se tiaj homoj praktikas ĝin, al kiuj mankas sufiĉe da kapableco kaj talento.

Oni aĉetas iun instruigan libron pri grafologio, studas ĝin supraĵe, kaj jam ekkomencas prijuĝi la manskribaĵojn. Kelkaj faras tion por plezuro, aliaj volas havigi al si malgrandan «kromenspezon» kaj kur-aĝas eĉ aperi publike.

Se temas pri simplaj, facile studeblaj skribaĵoj, tiam ili ja trafe prijuĝos. Sed kiel ekzistas simplaj kaj facile juĝeblaj skribaĵoj, tiel same oni trovas ankaŭ tre komplikitajn skribaĵojn kiujn oni ne povas tiel rapide kaj simple solvi.

Ekzistas tiel nomataj «riĉaj» kaj «malriĉaj» skribaĵoj.

La unuaj estas tiuj skribaĵoj, per kiuj oni povas ekkoni abundon da bonaj kaj malbonaj ecoj. Tiuj skribaĵoj devenas de homoj, kiuj havas karakteron plenan de kontraŭo, kiuj estas ŝanĝemaj, kapricaj kaj malordaj (ĥaosaj). Krom tiaj malharmoniaj ecoj tiuj homoj povas posedi abundon da bonaj talentoj. Ili estas «riĉaj» je ekvantoj.

Ekzistas ankaŭ skribaĵoj, pri kiuj oni ne bezonas multe diri. Tiuj montras certecon, firmecon, trankvilecon kaj ĉion, kio apartenas al harmonio kaj kontenteco pri si mem. «Malriĉaj» ili estas je ecoj, sed tre ofte riĉaj je boneco. Ili estas facile solv-eblaj. Kontraŭ tio estas manskribaĵoj de malkleraj kaj mallertaj homoj tre malfacile analizeblaj.

Kiujn ecojn devas havi la grafologo, por prijuĝi ĉiun manskribaĵon?

Homo, kiu pacience kaj ame kapablas studi la plej malgrandajn aferojn, kiu pripensas, ekzamenas, komparas la animojn, kiu sen antaŭjuĝo rigardas en si kaj ĉirkaŭ si, tiu povas ankaŭ esti bona grafologo. Li devas spirite ankaŭ sekvi strekon post streko de la skribinto, sagace ekvidi, kiel liaj pensoj flugis, konfuziĝis, kiel la plumo hezitis, ree rapidis, kaj kiel post medito la skribo klariĝis. Neniu antaŭjuĝo kaj nur konscienco devas gvidi la grafologon.

La manskribaĵojn de ŝanĝemaj, korpe kaj anime tro sentemaj, nerve malfortaj personoj oni devas prijuĝi tre singardeme, ĉar iliaj diversaj esprimo-movoj povas erarigi. Post ripozo, en anima harmonio ili skribas pli forte, ol post maldorma nokto, kiam iliaj literoj konfuze aŭ malkuraĝe intermiksiĝas montrante internen direktitajn pikilojn de pento. En tia situacio oni povus ilin nomi aĉulo, sed ili ne meritas tian akran juĝon. Kontraŭ tio povas havi maldelikata, nervoforta homo, kiu ofertas tutajn noktojn al ĝuado, tre firman manskribon kaj oni povus lin rigardi kiel nur sobran ĝuanton. Tial la grafologo ne povas prijuĝi enhavoplenajn skribaĵojn per kelkaj vortoj, li ne devas ignori la fortogradojn de diversaj ecoj.

Filozofia pensmaniero akordiĝanta kun bona kombinaĵo kaj ordigema talento kapabligas lin al bona stilo. Li devas el pluraj signoj tiujn emojn diveni, por kiuj en tiu skribo ne estas troveblaj specialaj signoj, ekz. la pasio por ludo, ŝtelo, vetado k.t.p. Esplorkapableco kaj vigla fantazio povas al li ebligi, ke li el la ĝenerala impresado de la skribo, sin prezentu kaj kvazaŭ antaŭ si vivigu la skribinton tiel, ke li tuj povas karakterizi lin.

Dum mia tridekjara grafologia kaj fiziognomika praktiko mi ofte spertis, ke post ĉiu studo de speciale komplika skribo aŭ portreto mi laciĝis. Mi interrompis la studon kaj prefere okupis min per viglaj aferoj en harmonio. Post kelkaj minutoj mi rapide prenis kraĵonon, faris stenografe notojn, ĉar abundeco de ecoj aperis antaŭ mi kiel lumeto post lumeto, multon mi malkovris. La fruaj horoj matene estas la plej taŭga tempo por la delikata sentema grafologo, ĉar dum tago aŭ vespero diversaj bruoj ĉiam interrompas la kontakton inter li kaj la analizota skribo. Sen tiu kontakto li certe ne povas trovi la profundajn delikatecojn de la animo kaj krom tio li bezonas ankaŭ amon kaj paciencon al tiu ĉi okupo. Maldelikata supraĵa grafologo povas per sia malbona analizo detrui interrilatojn kaj kaŭzi per tio domaĝon, eĉ malfeliĉon.

*El la novspirita ĵurnalo «Der neue Mensch»,  
Trad. S. Ĉipera.*



Domo de U. H. A. en San Paŭlo, Brazilo.

## *El Trezorejo de la Ceha Literaturo*

Boleslav Jablonsky (1813-81), populara ĉeha didaktika poeto, travivis sian virecan aĝon en Zverinec apud Krakovo. Lia



B. Jablonsky

kolekto «Moudrost ot-covska» (Lia patra saĝeco) estas tre disvastigita, ĝi estas populara instruo pri la amo al Dio, naturo, patrujo, nacio, homaro kaj belo. Noblanima humaneco sonas el liaj verkoj «Vitezstvi krize» (La venko de la kruco)

kaj «Ruze Sionska» (La rozo de Siono). En siaj junaj jaroj li skribis amajn kaj patriotismajn poemojn.

\*

### *La Vero Venkas*

Boleslav Jablonsky

*Se la suneliron barus  
Ĉiuj homoj sur la ter',  
Super horizont' ekstarus  
Tamen glora suna sfer'.*

*Kaj ĝi tamen bele brilus  
Super mont', eben' kaj val',  
Ĝia arda vang' utilis  
Al la hom' kaj animal'.*

*Same sankta font' de vero  
Kaj honesta la afer'  
Fine venkos sur la tero  
Eĉ demonon de infer'.*

Kompilis M. Louda, Praha.

# Universala Homama Asocio



*Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,  
Antaŭen kun pacaj armiloj!  
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj  
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.  
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,  
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro  
Al frata la celo ni iru obstine  
Antaŭen senfine!*

## **UHA-Movado en Suda Maro**

En januaro de 1932, laŭ la komisiono de UHA-Centro, la familio de s-ro Kida kaj s-ro Takacukasa enmigris en la insulon Ponape, sur Suda Maro, por tie disvastigi nian movadon. La fervoraj pioniroj ĉiam daŭrigis sindoneman propagandon inter la loĝantaro. Aliflanke ili starigis kompanion «Kaieŝa», sub la administrado de U.H.A. Komence ĝia ĉefa okupo estis glaciofabrikado, lignofarado, ktp. Dank' al Dia favoro, la tuta afero sukcesis kaj atingis altan reputacion. Jam sufiĉe da nombro aliĝis al U.H.A. En la printempo de la lasta jaro niaj fervora propagandisto s-ro Uŝiro kaj du junuloj veturis tien, kiuj multe helpis kaj progresigis la movadon. De tiam la movado salte progresis.

En la frua aŭtuno de 1934, «Kaieŝa» aĉetis vastegan terenon (720,000 kvadratmetrojn) por agrikulturado. Oni nomis ĝin «Aizen-Nooen», UHA-Agrikulturejo. Do la Centra Oficejo nove sendis tien dekon da memvoluloj (eĉ du virinoj) el junaj laboroferantoj en la Centro de Kameoka. Ili forlasis la havenon Jokohama en la 2a de la kuranta jaro.

Aparte, s-roj Monzi kaj Mijazaki, kiuj ankaŭ estas oficialaj senditoj speciale por propaganda laboro, ekde la lastjara aprilo migradas tra la Insularo por plenumi siajn sanktajn misiojn.

Ilia laboro komencis jam alporti belajn fruktojn. Ni jam bonvenigis dekojn da gastoj el tiel melproksima Sudo; ne nur japanoj sed eĉ indiĝeno s-ro M. Iliarte el la insulo Saipan vizitis nin. Li restis en nia Kameoko dum duon-jaro por mem studi pri ambaŭ movadoj Oomoto kaj U.H.A. Ne estos tre malproksime, kiam la UHA-Standardo flirtos en ĉiuj insuloj de Suda Maro. Sube ni publikigos du raportojn de s-roj Uŝiro kaj Monzi. (La RED.)



## **Letero de s-ro Uŝiro, en Ponape.**

La 2an de januaro nia grupo enŝipiĝis sur Oomimaru (3300 tunoj) ĉe la haveno de Jokohama. Amaso da Oomotanoj kaj UHA-anoj forvidis nin kaj kuraĝigis nian ekiron. En la ŝipo s-roj Kajima kaj Kida propagandis UHA-doktrinon al pasaĝeroj, kio bone sukcesis kaj ni jam akiris kvin aliĝintojn. Post kvintaga laciga navigado nia ŝipo ĵetis ankron ĉe la haveno Saipan. Denove mi vidis la belan urbon, kiun mi forlasis ĝuste antaŭ unu jaro por reveni al la Patrujo. Ĉe la kajo multaj samideanoj varme bonvenigis nin, ni ankaŭ vidis la standardon de la UHA-filio. La sceno estis vere honoriga por ni! Sekvante la standardon ni vizitis Saipan-sanktejon, Insulo-Administrejon kaj ĵurnalejon «Nanjo-



Asahi», kie ni fotografiĝis kun ĝiaj ĉefaj sinjoroj. Utiligante la tempon de ŝiphalto ni vizitadis ankaŭ s-ron Monzi kaj aliajn amikojn. Kelkaj sinjoroj bonvolis donaci kvar branĉojn da freŝaj bananoj, citronojn kaj kukojn... Kun kora danko ni enportis la grandegan pakadon en la ŝipon. Jes, grandega donaco, ne formanĝebla ĝis la sekva ŝiphalto!

La 11an ni surteriĝis sur la insulo Truck. Post la unua vizito al tiea sanktejo, kiel kutime, ni venis al s-ro Takeda, kie troviĝas nia Oomoto-filio. La sekvan vesperon ni denove enŝipiĝis kaj du tagojn poste atingis la longe atenditan insulon Ponape. Pluraj boatoj ornamitaj de UHA-flagoj ĉirkaŭis nian ŝipon, responde al ili ni ankaŭ svingis la flagojn. Kondukite de niaj samideanoj ni bone atingis la kompanion «Kaieŝa», kie ni noktiĝis komforte. Al s-ro Uemoto (fili-estro) ni transdonis UHA-standardon, kiun ni kunportis de nia Centro de Kameoko.

La sekvan tagon ni iris al proksima monteto, kie etendiĝas la vastega UHA-agrikulturejo. En tiu vespero oni okazigis bonvenigan kunvenon en «Kaieŝa», denove ni estis vermege akceptataj. Post unutaga ripozo ni jam komencis transloĝi al la agrikulturejo. Nun la nova vivo komenciĝis en la kampara budo. Nia estonteco estas plena je espero kaj laboro!

✻

## *El Taglibro de s-ro Monzi, en Saipan.*

*La 7a de januaro.* Frumatene la ŝipo Oomimaru tuŝis nian insulon, per kiu nia nova grupo akompanata de s-ro Uŝiro venis. Ni do iris al la haveno por bonvenigi ilin. Post vizito al la sanktejo, tagmanĝo ĉe mi, ni kune vizitis Oomoto-filion ĉe s-ro Hattori, kie ni havis gajajn horojn kaj ili prezentis diversajn filmojn, kiujn ili kunportis de Kameoka por propaganda celo. Vespere je la 5a ilia ŝipo ekiris suden por Ponape.

*La 13a.* Matene ni havis kunsidon por propagando kaj mi faris paroladon pri



La Administrejo de l' insulo Ponape.

«Koodoo». Posttagmeze mi vizitis s-ron Hattori. Li diris ke li nun klopodas konstrui novan domon por Oomoto-filio. Certe lia ekzisto estas dankinda, kaj li meritas grandan laŭdon por prosperigo de nia movado ĉi tie.

*La 15a.* Hodiaŭ oni havis la elekton de reprezentantoj de nia urbo. La rezultato estis ke dekdu elektitoj estis UHA-membroj el la tuta nombro de dek ses. Jen bona pruvo, kiom disvastiĝas nia UHA ĉi tie.

*La 24a.* Memore de la elkonstruiĝo de la nova Asahi-ĵurnalejo, ni okazigis Oomoto-Ekspozicion, en kiu ni elmontris diversajn ellaboraĵojn de nia majstro Onisabro Deguĉi, ekz. verkaĵojn, kaligrafiaĵojn, desegnaĵojn ktp. Kiel mi antaŭsupozis, tio bone sukcesis kaj atingis altan reputacion.

*La 27a.* Jam pasis preskaŭ unu jaro de kiam mi venis ĉi tien. Komence mi sentis iom da soleco kaj melankolio, sed nuntempe mi tute alkutimiĝis al la vivo de tiel fora insulo, eĉ ĝi fariĝis interesa kaj agrabla. Diversaj komunikaĵoj, gazetoj kaj ĵurnaloj sendataj de la Centro ĉiufoje alportas al mi grandan plezuron. Japanaj amikoj ofte ridigas min skribante ke mi transdonu saluton al s-ro Mijazaki, kiu loĝas en alia insulo, malproksima ĉ. 800 mejlojn de mi. Ili pensas eble ke Sudmara Insularo estas tiel malvasta kaj interkomuniko ne estas tiel malfacila. Nia insulo Saipan estas kvazaŭ enirpordo de Sudmara Insularo. Ĝi enhavas pli ol dudek mil loĝantojn. La urbo Saipan estas tre kulturita kaj estas metropolo de l' tuta insularo, ĉar tie troviĝas plej ĉefa Administrejo.

## Japana lingvo por Esperantistoj

«La japana lingvo — kun sia kurioza gramatiko, malcerta origino, antikva literaturo — estas lingvo iuda al pli da atento ol ĝi ricevis ĝis nun.»

Prof. R. H. Chamberlain.

( 31 )

### La Kaŭzativo

La lernanto estas memorigita pri la Pasivo kaj la Potencialo antaŭe traktitaj, sen kies kompreno la Kaŭzativo estas neebla. Ankaŭ ĝi estas specialaĵo de la japana lingvo sed feliĉe Esperantisto povas bone kompreni ĝian sencon kiu estas tiu de nia sufikso «igi».

La Kaŭzativo estas formata kiel sekvas: Klaso I: oni aldonas la sufikson *sareru* al la simpla radiko.

Klaso II: oni aldonas la sufikson *seru* al la a-radiko.

Praktikaj ekzemploj de la supraj reguloj:

verbo	radiko	kaŭzativo	senco
taberu	tabe-	tabesaseru	manĝigi
miru	mi-	misaseru	vidigi
abiru	abi-	abisaseru	banigi
kiru	ki-	kisaseru	vestigi
kaku	kaka-	kakasaseru	skribigi
matu	mata-	matasaseru	atendigi
iu	iwa-	iwaseru	dirigi

Esceptaj estas la sekvaj formoj:

verbo	kaŭzativo	senco
suru	saseru	farigi
kuru	kosaseru	venigi
sinu	sinaseru	mortigi

**Grava Noto:** la ĝentila finaĵo «-masu» neniam ŝanĝiĝas sed ĝi ĉiam povas sekvi en la lasta loko, ja eĉ post Pozitivo, Potencialo, Kaŭzativo.

**Pozitivo, Potencialo, Kaŭzativo:**

**Kombinita uzo**

La supraj verboformoj povas esti uzataj kombinite sed nur laŭ la ĉisuba maniero:

Pozitivo + Potencialo . . . (A)

(A) + Kaŭzativo . . . (B)

Por ne-matematikemuloj ni klarigas pli

detale en la sekvaj alineoj, tamen la supra formulo grave helpas la memorigon kiam oni komprenos la funkciadon de l' verbaj formoj.

A) *Pozitivo kaj Potencialo:*

**Tabesaseru:** la verbo *taberu* = *manĝi* estas unue en la Pozitivo (*tabesasu*) kaj due en la Potencialo (*eru*). La signifo estas konsekvence: *manĝigi*.

B) *A (Pozitivo kaj Potencialo) kaj Kaŭzativo:*

**Tabesaserareru:** la verbo *taberu* = *manĝi* estas unue en kombinita formo de «Pozitivo kaj Potencialo» (klarigon vidu sub «A») kaj due en Kaŭzativo. La senco estas konsekvence: *manĝig-ata*.

Por kompreni la supran formon, oni imagu, ke patrino ordonas al servistino, ke ŝi manĝigu la infanon. La infano estas tiam «manĝigata». Tiun ĉi subtilaĵon de la japana lingvo oni ne povas esprimi per unu vorto en iu ajn lingvo krom Esperanto!

Kelkaj frazoj praktike komprenigos la suprajn regulojn:

*Isya wo yobaseta* = (li) venigis kuraciston.  
*Ido wo horasemasyō* = (ni) fosigos puton.  
*warawasita!* = (li) ridigis (min).

**Aganto kaj Subjekto**

Ĉe transitivaj verboj oni metas la subjekton en Akuzativon (I).

Ĉe ne-transitivaj verboj oni metas la subjekton en Dativon (II).

**Ekzemploj:**

I) *Gedyo wo Isya no tokoro e yukasu.*  
servistinon kuracisto de loko al irigi  
2 6 5 4 3 1

Subjekto «servistino» estas en Akuzativo.

II) *Gedyo ni Isya wo yobaseta.*  
servistino (al) vokigis

t. e. (li) vokigis kuraciston pere de la servistino.

«Pere de» estas esprimita japane *pere de* la Dativo.

## PRI LA TRADUKARTO

En «Konversacio kun anĝelo, kaj aliaj eseoj», Hilaire Belloc, mondkonata angla historiisto kaj publicisto, skribas: «Tra la okcidento troviĝas ne malpli ol kvin tute diferencaj grandaj lingvoj, al kiuj apartenas kiel derivaĵoj almenaŭ cent ne tiel grandaj. Neniu homo, eĉ la plej klera kaj multevogaĝinta, plene posedas tiujn kvin lingvojn. Nur tre malmultaj homoj povas rajte pretendi al tri; du-tri (el multaj milionoj) povas aserti scipovon de du...

Ekzemple, mi povas malfacile grimpi vojon tra itala aŭ hispana gazeto. Mi ne povas fari tion en germana. Mi povas legi francan ĵurnalon, ne sambone kiel anglan, tamen kun sufiĉe plena kompreno. Sed kiam temas pri la literaturoj de tiuj lingvoj, ekz. la ordinara romano, mi tute ne povas legi germanan; ne, kun facilo, italan; ne hispanan (se ĉe tiu lasta vi ne permesas al mi trikvaronojn da konjekto). Ĉe la granda majstroliteraturo, kie mi volas ricevi tujan senton de estetika animleviĝo pere de la legado, mi ne povas legi en iu lingvo ekster la angla. Malgraŭ mia vasta kono de la franca, mi neniam povas esti certa pri mia juĝo, taksante pecon de franca poezio, tio malpli pri franca prozo. En mia konataro troviĝas alte kulturitaj homoj — ĉirkaŭ dekduo — kiuj povas bone juĝi en du aŭ eĉ tri lingvoj ekster la angla; sed dum mia tuta vivo, kiu kuntuŝigis min kun multege da aliaj kleruloj, mi renkontis nur du, kiuj, eĉ en ĝeneralaj trajtoj, estis familiaraj kun la kvin lingvoj — nur unu homo plene posedis ilin».

Aliloke Belloc avertas, ke «tiuj tre saĝomankaj homoj, kiuj imagas la anglan fariĝi la universala medio por la blanka civilizacio, devas konfesi, ke ĝia vasta etendiĝo alportas ankaŭ la plej bedaŭrindan difekton al ĝia kvalito».

Li konkludas, ke «bona tradukado postulas altgradan talenton flanke de homoj dezirantaj reprodukti la spiritan ritmon, la karakteron, la esencon de la originalo», kaj mencias ĵurnalsman tradukadon, kiel «ŝokan misrepresentadon de naciaj sentoj al eksterlando, kaj malsanan fikreskon sur nia moderna gazetaro».

Belloc pritraktas la diverse vastajn kaj subtilajn malfacilaĵojn, kiuj kuŝas en la tradukado de unu nacia lingvo en alian, inter kiuj estas la senfinaj diferencaj pensasocioj kaj nuancoj de vortoj erare rigardataj kiel sinonimoj (ekz.: rue kaj street), la «manko de preciza sameco de apartaj vortoj en du diferencaj lingvoj, la karaktercaj saltoj de penso en malsamaj civilizacioj, laŭ kiuj la retorikaĵo en unu lingvo fariĝas simpla prozaĵo en alia, aŭ laŭ kiuj la pensordo en unu estas ĥaoso en alia. Krome estas la fakto, ke certaj konceptaĵoj troviĝas en unu sed ne en alia (ekz.: la francaj vortoj constater, droit, directive; aŭ la anglaj gentleman, scholar, fun, ktp).

Tiam li demandas: Kia ekonomia bazo ekzistas sur kiu ni donu fidelajn tradukojn? kaj respondas mem: Bone paganta demando por tiaj, aŭ subvencio de riĉulo aŭ la ŝtato. Ke la kvin ĉefaj lingvoj daŭre devas esti nebone intertradukataj, ĝuste pro manko de mono kaj kompetenteco, donas nur malgrandan esperon al la literaturistoj kaj sciencistoj parolantaj la centon da malgrandaj idiomoj, kiuj konsistigas la babelon de okcidenta Eŭropo. Ilian vidpunkton ne konsideris aŭ ne agnoskis s-ro Belloc. Plie, malfacile estas kredi, ke nur nescio de la pretendoj kaj sukcesoj de Esperanto igis lin fini sian eseon sen eĉ mencii tiun lingvon.

*R. Banham, Melbourne, Australio.*



## Literatura Kritiko



«OOMOTO INTERNACIA meritas atenton kaj simpatian ĉar inspirita de nobla toleremo ĝi preparas larĝan vojon, kies perspektivoj promesas harmonian kunlaboron. Jen tial mi estas ĝia sincera amiko.»

Julio BAGHY

★ **WHAT IS OOMOTO?** *Angla broŝuro, 2-a eldono, 136 paĝoj, multaj ilustraĵoj, prezo: 1 svisa franko. Eld.: Oomoto Centra Oficejo, Kameoka.*

Jen la unua provo, laŭ mia scio, por turni la atenton de la anglalingvanoj al la nova spirita movado floranta en la malproksima oriento, movado pri kies ekzistado eĉ ne sonĝis la plejmultaj angloj. Vere modesta estas ĉi tiu provo. Nur malgranda libreto, tamen ege taŭga por sia celo.

Unue la leganton frapas la ĉarma simpenco de la stilo. Li scias laŭ la stilo, ke ĝin tradukis neanglalingvano, tamen se li atendas nekompreneblaĵojn, li baldaŭ trompiĝos. Per simplaj vortoj kaj simplaj frazoj la tuta panoramo de Oomoto riveliĝas antaŭ li. Troviĝas neniam multornamaj metaforoj, mankas ĉia strebado al bela skribado. Nenie la penso estas vestita per fantaziaĵo por kaŝi malriĉecon de ideoj, kiel ofte kutimas en religio-filozofiaj verkoj. Ĉio estas simpla, klara kiel la tago, kiel devas esti ĉe libro celanta la grandan amason de ordinaraj homoj.

La libro komenciĝas per kelkaj geografiaj skizoj prezentantaj al la leganto la lokojn sanktigintajn por la Oomotanoj. Sekvas historia priskribo detale rakontanta pri la origino kaj disvolviĝo de la nova religio, kaj donanta, kompreneble, multan lokspacon al la Fondintino Nao Deguĉi kaj al la Savanto Onisabro Deguĉi.

La intereso de la libro portas la leganton

facile tra la unuaj kvindek paĝoj. Tiam komenciĝas la detala klarigo pri la principoj de Oomoto, kaj ĉi tie la angla leganto devas iom koncentrigi siajn mensajn kapablojn, precipe se li ne kutimis al filozofia studado. Nek la stilo, nek la klarigado de la principoj, estas malfacilaj, sed la ideoj estas iafoje fremdaj por menso edukita laŭ kristanaj konceptoj, kiu devas kelkfoje forĵeti siajn antaŭkonceptitajn ideojn. Grandan laŭdon meritas la trafa elekto de anglaj vortoj por traduki la specialajn terminojn de la Oomoto-instruo.

Post la klarigoj ni revenas ankoraŭfoje al interesaj priskriboj. Temas nun pri la vivmaniero de la Oomotanoj, kio pli ol io alia en la libro allogos la okcidentanojn, pri la laboro kaj sukcesoj de la movado, pri ĝia nuna stato, kaj pri la rolo de Esperanto en Oomoto.

Komparo kun la Esperanta eldono montas, ke la angla varianto enhavas multajn ekstrajn pecojn kaj kelkfoje pli plenajn priskribojn.

La ĉarmon kaj valoron de la libro pligrigas la belaj ilustraĵoj. La presado estas klara kaj plaĉe aranĝita, la papero bonega (multe pli bona ol ĉe la Esperanta eldono), kaj preseraroj preskaŭ tute mankas, kio lasta estas rimarkindaĵo ĉe angla libro presita kaj eldonita en Japanujo.

G. Badash, Anglujo.

★ Ŝ. Inoue: «Praktika Konversacio Esperanta». Eld. Esperanto-Propaganda Asocio, Kameoka, Japano.

nujo. p. 130, 13 x 19 cm., ora surpriso, bela kartona kovrilo. Prezo: 1 yen por Japanujo, 1. 5 sv. fr. por eksterlando.

Rimarkigita de l' aŭtoro mem (kun apeuaŭ agnoskebla kolereto!) pri la recenzo, nun la recenzanto kun humila pardonpeto rapidas plenumi sian taskon por tiu ĉi utila libro, eldonita ho! jam en la aŭtuno de 1933, memore de la 10-jara Jubileo de E.P.A. Ĝi estas kolekto de konversaciaj frazoj, klasigitaj en kvin partoj: pri tempo, somero, aŭtuno, vintro, kaj diversajoj. Ĉar ĉiuj Esperantan tekston akompanas japanlingva traduko (la lasta estus pli pitoreska en la stilo!) la libro estas tre taŭga por japanaj komencantoj, des pli ĉar sube estas sufiĉaj klarigoj por komentariindaj vortoj kaj frazoj. La aŭtoro estas konata 'rapidega parolanto', tiel ke la recenzanto volonte donas al li honortitolon (?) de «parolmaŝino». Tio pruvas la bonenhavon kaj praktikan valoron de tiu konversacia libro. Aliparte, legante tiajn ĉjutagajn frazojn oni povas scii ankaŭ japanajn kutimojn. Do ĝi estas varme rekomendinda ankaŭ internacie. (J. Hidejoŝi)


★ *Stellan Engholm: Al Toronto. Dua eldono. Ĉe Eld. Soc. Esperanto, Stockholm 1. 96 paĝ. Prezo: broŝ. sued. kr. 1:20. (= 1 sv. fr.)*

La esperanta romano de la sveda verkisto Stellan Engholm vekis siatempe grandan intereson tiel pro la temo pritraktita kiel pro la bela lingvaĵo. La unua eldono baldaŭ elĉerpigis; kaj nun aperis dua eldono, kio estas malofta okazaĵo ĉe libro originale verkita en Esperanto.

La aŭtoro ĉerpis la temon de sia romano el la kampara vivo lin ĉirkaŭanta. Serene li rakontas pri la vivo de la laboristoj en fabrikejoj, iliaj interesoj, zorgoj kaj revoj. Amhistorio de du gejunuloj formas la ruĝan fadenon kaj tenas la intereson de la leganto ĝis la fino.

La nova eldono prezentiĝas en bela eksteraĵo kaj estas presita sur bona papero.

H. J.



*La bildo de Kamejama-Kastelo, kiu antaŭ sescent jaroj staris en Oomoto-Teritorio de Kameoka.*

## Nia Poŝto

★ Al **nij** mon-sendintoj, precipe el anglaj kolonioj: Okaze de mousendo, nepre komuniku al ni aparte kun legebla adreso, ĉar per sola poŝtmandato ofte ni ne povas aranĝi la aferon.

★ Al s-ro **J. Neukomm**, Pompey, Francujo kaj s-ino **C. M. Horning**, Hilversum, Nederlando: Vi bonvolis fariĝi niaj Dumvivaj Abonantoj, kio estas ne nur simpla subteno por nia preskapitalo sed ja estas imitinda ekzemplo por ĉiu membraro kaj samtempe por ni granda laborkuraĝigo. Por sincere vin danki ni sendas al vi la donacon de Sinjoro Hidemaru Deguĉi (japanan murpendaĵon) pri kies detalo bonvolu legi nian rimarkon en O. I. febr. p. 32.

★ Al s-ro **E. R. Ontoria**, Bs. Aires, Argentino: Ni konfirmas la ricevon de via artikolo, kiun ni publikigos tre baldaŭ. Ni plene konsentas vian opiniion kontraŭ la danĝera ideo kaj facilanima reformemulo de nia kara lingvo.

★ Al s-ro **M. L. do Rego**, Lisboa, Portugalujo: Kun granda danko ni kvitancas tie ĉi por la sendita mono — 20 sv. fr. por Oomoto-Fotalbumo kaj 5 sv. fr. por jarobono de O. I. Ni tuj faris necesajn enskribojn kaj la Fotalbumon ekspedis en for-

tika pako.

★ Al s-ro **J. Windisch**, Levice, ĈSR: Estas dezirinde ke fotoj publikigotaj en O. I. estu tre klaraj (brilaj) kaj prezentantaj la morojn, kutimojn, espistajn agadojn, ktp. Ni atendas taŭgajn materialojn!

★ Al s-ro **E. Maunder**, Glenwood, Anglujo: Kun tagoj rapidege ŝanĝiĝas la cirkonstancoj, precipe politikaj; kaj kiel vi avertas, la senditaj novaĵoj jam estas tro malfreŝaj por publikigi. Do tre bedaŭrinde...

★ Al s-ro **Avoto**, Londono: Ni gratulas la progreson de P. E. L. Via artikolo aperos en la sekva numero. Estonte bonvolu skribi pri la studo, sperto, k. s., kiuj pli interesos niajn legantojn.

★ Al s-ro **P. Embring**, Alingsas, Svedujo: Por anonceto sendu 2 resp. kuponojn aŭ preferinde jara-bonon. En la lasta okazo ni anoncos ankaŭ senpage en nia porjapana Esp-gazeto «Verda mondo». Vi porfitu duoble!

★ Al «**Evolucion**» (Grekujo); «**Elo Fraternal**», «**Revelacion**» (Brazilo); «**La Luz del Porvenir**», «**Informilo de Zamenhof-Instituto**» (Hispanujo); «**Luz**» (Argentino): Ni dankas al ili pro la senditaj ekzempleroj kaj humile pardonpetas, ke ni ne povas reciproki.

## Korespondado

Kun japana fraŭlino pri japana vivo deziras korespondi, s-ro Birger Wernhämmer, Huddinge, Svedujo. Respondo garantiata.

Filatelistoj, Esp-propagandistoj! Mi interŝanĝas diversajn esp-propagandaĵojn, poŝtkartojn, ktp. kun ĉiuj landoj. Certe respondas. S-ro Bertil Zell, Genevad, Svedujo.

Deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj — s-ro W. Laumen, Luifelstr. 11, Roermond, Nederlando.

Paul Embring, Alingsas, Svedujo deziras korespondi kun instruistoj el Japanujo kaj el aliaj landoj.

Juna, 29-jara studento deziras trovi geamikojn en Oriento kaj Sudo; korespondas angle, esperante, germane pri ĉiu temo. S-ro Jan Ziembicki, Stryj, Kruzywa 11, Polujo.

## TARIFO DE OOMOTO INTERNACIA

Abonanto: 5 svisaj frankoj, 25 francaj frankoj aŭ ĉiu egalvaloro.

Subtenanto: 20 sv. fr. por 5 jaroj.

Dumviva abonanto: 50 sv. fr.

Reklamo: Tuta paĝo: 30 sv. fr.,  
duona paĝo: 15 sv. fr.

Anonceto: 5 linioj = 2 resp.-kup.

定價 壹部 貳拾錢 壹ヶ年貳圓四拾錢  
昭和十年四月一日印刷 昭和十年四月一日發行  
編輯發行印刷人 高木鐵男 京都府南桑田郡龜岡町  
荒塚字内丸一  
印刷發行所 天聲社 (振替大阪75917番) 全

Oomoto-Presejo, Ten'on-kjo, Kameoka



# Enhavo

Japana naciismo kaj Esperanto . . . . .	3	La grafologio . . . . .	26
Pri semado kaj rikolto . . . . .	5	El trezorejo de la ĉeĥa literaturo . . . . .	27
Penu akiri spiritan paŝon . . . . .	8	Universala Homama Asocio :	
Orienta Filozofio (3) . . . . .	10	UHA en Suda Maro . . . . .	28
Vortoj de Sinjoro O. Deguĉi (4) . . . . .	12	Letero de s-ro Uŝiro . . . . .	28
Spirito fluganta . . . . .	14	El taglibro de s-ro Monzi . . . . .	29
La nacia karaktero de japana popolo . . . . .	16	Japana lingvo por Esperantistoj (31) . . . . .	30
Japanujo (6) . . . . .	21	Literatura kritiko . . . . .	31
Juĝo per sonorilego . . . . .	25	Nia poŝto . . . . .	34

INTERNACIA GAZETO KIU ANSTATAŬAS SES DIVERSAJN estas

## **“EUROPEAN HERALD”**

*Redaktata en la lingvoj :  
Angla, Germana, Franca,  
Hispana, Itala, Esperanta.*

Intervjuoj, Ĝeneralaj artikoloj, Noveletoj, Leteroj el Ĉefurboj, Vojaĝartikoloj, Recenzoj, Teatra kritikado, Komerca kaj Financa Kroniko

El Ĉiu Eŭropa Lando.

La paĝo «Herald's College» servas speciale al ĉiu studento de fremdaj lingvoj.

Abonprezoj :

3 mon. 3s. 3p. ; 6 mon. 6s. 6p. ; 1 jaro 10s.

APERAS ĈIUN VENDREDON

Eldonejo :

110-111 Fleet Street, LONDON E. C. 4.

*Dusemajna organo por la junularo*

## **La Juna Vivo**

*Malkara Esperanto-gazeto por ĝeju-  
nuloj kaj komencantoj. Interesa  
enhavo. Facile komprenebla stilo.  
Taŝga legajo por kursoj.*

*Jarabono : 10 fr. fr., aŭ egalvaloro.  
Petu senpagan specimenon !*

LA JUNA VIVO, West-Gaftdijk (N. H.).  
Nederlando.

★ *Ni intersanĝas reklamon kun  
tutmondaj Esp.-gazetoj. Bonvolu  
sendi al ni reklamtekstojn kaj  
specimenan gazeton. Ni estas ĉiam  
pretaj por reciproka servo.*

La Red. de O. I.

## **La Interligilo de l' P.T.T.**

Centra organo de fakinformoj  
por Poŝtistoj, Telegrafistoj,  
Telefonistoj.

(Fondita en 1922)

Monata — Internacia — Teknika  
— Ilustrita en Esperanto

Jarabono : 20 fr. fr.

*Por helpi vian fakan tutmondan  
organon ne hezitu, sed tuj sendu  
vian kotizon al la redaktejo :*

Petro FILLIARTE, 324, Rue  
Lecourbe, PARIS XVe, Francujo.

# NIA ESP.-LITERATURO

## Kio estas Oomoto ?

5-a eldono. Kompleta indiko pri la historio kaj nuna stato de Oomoto . . . 100 paĝoj kun multaj fotoj.  
Sv. Fr. 1.00

## What is Oomoto ?

La plej kompleta konigilo pri la potenca spirita movado por anglalingvanoj. Multaj interesaj informoj pri Japana kulturo. 130 paĝoj kaj multaj ilustraĵoj.  
Sv. Fr. 1.00

## Sinjoro Laŭdata

Vera literatura trezoro, kun originalaj poemoj, kaj frazoj dediĉitaj al Majstro O. Deguĉi de tutmondaj Esperantistoj. 2-a luksa eldono, modele aranĝita, ore surpresita, tole bindita, 200 paĝa. Teksto: Esperante kaj japane.  
Sv. Fr. 2.50

## Fundamento de Animo

Verko de nia Majstro. Plena pritrakto de Oomoto-Instruo pri homa spirito, postmorta vivo, spirita mondo, ktp., en 10 ĉapitroj. 50 paĝoj.  
Sv. Fr. 0.50

## Perpoema Vortaro Esperanto — Japana

De Onisabro Deguĉi, enhavataj 4,800 japanaj poemetoj verkitaĵoj en lerta kaj sprita maniero, tute facile memorigas saman kvanton da Esp. vortoj. Bonega ornamo de ĉiu biblioteko, kun bela kovrilo el silko. 360 paĝoj.  
Sv. Fr. 3.00

## Oomoto-Fotalbumo

Bildperspektivoj de Oomoto. 200 fotogravuraĵoj sur luksa papero kun esperanta kaj japana klarigoj. Formato: 29 x 37 cm. Prezo: 20 sv. fr. Limigita eldonnombro, bibliografia maloftaĵo!

Ĉiu prezo enhavas sendkoston. Mendu ĉe:

**Libro-fako de Oomoto Internacia**

Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

